Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 26 - trimonata **1/96**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Fiandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

Stefan MACGILL: Edward Symoens 1915-1995 (nekrologo)..... 1
Duncan CHARTERS: Mesaĝo.... okaze de la morto de Edward Symoens..... 2
Edward SYMOENS: La propedeŭtika valoro de Esperanto..... 3
Protokolo de la Komitatkunsidoj en Övik (Raymond WYLLEMAN)..... 5
Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1991-1995 (József NÉMETH)..... 10
Katalin SMIDÉLIUSZ: BEKunu, BEKdu, BEKtri, BEKkvar... (dua parto).... 16
30-a ILEI-Konferenco, 4-a Gimnazio de ILEI (aliĝiloj)..... 17
El la landoj kaj sekcioj..... 24
Christian DECLERCK: Reage al 1/95 kaj 2/95 - Golden..... 31
Ekzamenoj 1995 (Marija *Belošević*, Ivan *Bekavac-Basić*)..... 32
Por via notlibro..... 33
„*Leterkesto*", „*En la sekvaj numeroj aperos...*"..... 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122.
Internet: charters@csc1.prin.edu.
Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado.

Sekretario: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio.
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Membro: Brunetto Casini, Casella Postale 213, I-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85

Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. *Konferencoj.*


Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303.
Eksteraj rilatoj, instruado de infanoj.

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342.
Gimnazio de ILEI. Servoj al instruistoj, trejnado de instruistoj.

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario.
Eldonado

Observanto (UEA): Renee Triolle, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, F - 77160 Provins, Francio

Edward Symoens 1915-1995



Ni bedaŭras anonci la morton de nia plurjara prezidanto kaj liga motoro, s-ro Edward Symoens. Dum 65 jaroj da esperantisteco li persiste agadis, precipe en la kampoj de informado, edukado kaj la eŭropa integriĝo.

Naskiĝanta en 1915 en Austin Texas kaj profesie laborinte dum tridek jaroj en Afriko kiel lernejestro kaj eduka gvidanto, li portis transnacian vidpunkton al ĉiu sia entrepreno. Tio trovis konkretiĝon en liaj ILEI-jaroj en ripetaj provoj kunordigi inform-kampanjon pri la divers-specaj pedagogiaj valoroj de E-o, samtempe en pluraj landoj, kun simultanaj aliroj al eduk-ministerioj.

El tiu strebado fontis pluraj tre utilaj inform-dokumentoj, aperintaj en Esperanto, la angla, franca, flandra kaj itala, kaj la daŭre kompletigata bibliografio de disertacioj pri E-o kaj interlingvistiko, unue aperinta en 1989.

S-ro Symoens iniciatis nacian radiokurson en Flandrio en 1946, poste en Afriko (1947-75) li helpis krei esperantajn grupojn en Zairio kaj Ruando. Reveninte, li plonĝis en la landan agadon, ĝuste kiam Flandra E-Ligo estis reorganizanta sin kaj starigis la konatan E-domon en Frankrijklei (Antverpeno), kie nia IPR estas presata. Li prezidis FEL de 1979 ĝis 1984 - kio inkluzivas la sukcesan okazigon de UK en 1982. Li restis vic-prezidanto de FEL ĝis 1990, kiam li iĝis ĝia honora prezidanto. UEA nomis lin honora membro en 1993, laŭ iniciato de ILEI, kies honora membro li iĝis en la pasintjara konferenco en Övik.

Transpreninte la vic-prezidantecon de ILEI en 1985, la estraro tiam evitis timatan hiaton pro la forpaso aŭ retiriĝo de pluraj el ĝiaj tiamaj aktivuloj. Post prezidantiĝo en 1987, tre baldaŭ li skizis novajn celojn, gvidliniojn kaj laborplanojn, kiuj ankoraŭ nun forte influas la ligan funkciadon. Konkretaj atingoj responde al tiuj celoj videblis en formo de ekzamenaj kaj instruistokursaj relanĉoj kaj aro da novaj eldonaĵoj. S-ro Symoens havis proksimajn ligojn tra la propra landa agado al UEA; li laboris por ripari la siatempajn vundojn inter la du instancoj, por trovi akceptéblan formon de kunekzisto kaj kunlaboro, tenante tamen por la Ligo plenan sendependecon kaj identecon. Akcepto ĉe UEA, ke ILEI prizorgu la realigon de ĝia eduka programo kun disponigo de la respondaj financaj rimedoj reprezentis solidan atingon de ILEI sub lia gvido.

Eble la plej produktiva kaj bonetosa estrarkunsido de la tuta periodo estis tiu en februaro 1991 ĉe la familia hejmo Symoens en Kalmthout. Tiam ni povis mem konstati la imponan bibliotekon kaj laborĉambron kun bretaroj da zorge ordigitaj dosieroj kaj dokumentoj - la nervocentro de lia senlaca agado. Niaj

membroj certe memoros lin skrupula leter-respondanto, facile alirebla, ĉiam pacienca, preta aŭskulti, samtempe grandvizia kaj persiste laborema.
Por mi persone, estis agrable, facile kaj instige servi kiel vic-prezidanto en lia estraro; atesto je tio estas samdirekta daŭrigo en la gvida stilo kaj celaro de la Ligo en la posta deĵor-periodo. Lia influo sentiĝos en la pluiro de la Ligo, kiel ankaŭ lia memoro ĉe ĉiu, kiu konis lin kaj laboris kun li.
ILEI esprimas sinceran kondolencon al liaj familianoj.

Stefan MacGill

MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE ILEI

okaze de la morto de Edward Symoens

Nome de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), necesas ke mi kontribuu kelkajn vortojn al la honorigado de la meritoj de nia ĵus forpasinta kolego.

Edward Symoens ĝis la morto estis konata kiel klarvida kaj dediĉita kunlaboranto en la antaŭenigo de la instruado de la internacia lingvo Esperanto. Dum sia servado kiel Prezidanto de ILEI, li rekonis la esencan rolon de la celoj de la Ligo en la progreso de la tutmonda E-movado. Tio motivigis lian sukcesan reproksimiĝon de la Ligo al UEA kaj la sekvan pli intiman kunlaboron kun UEA en la reciprokaj celoj de la du organizaĵoj. Li ne serĉis por si gloron, sed rekonis talenton en aliaj kaj per sia afabla, diplomatia kondutmaniero kuraĝigis kaj apogis ĉiun laŭcelan labordecidon. Sian klerecon kaj inteligenton li montris interalie per modela verkado, kiu inkluzivis gravan plurlingve eldonitan studon pri la pedagogia valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj.

Ĝis la morto li servis al ILEI kiel komisiito aŭ reprezentanto en diversaj funkcioj, ekzemple montranta dum multaj jaroj la fidon de la membraro kiel estro de la kandidatiga komitato por oficoj de la Ligo. La meritoj de lia laboro por ILEI motivigis la antaŭnelongan rekonon de liaj kontribuoj kiam li nomiĝis kaj akceptiĝis kiel Honora Membro de la Ligo.

Edward Symoens multe mankos al ni ĉiuj, tamen la inspiro de lia ekzemplo kaj liaj konkretaj atingoj por plibonigi la mondon kaj la homajn rilatojn ne povos perdiĝi al ni. Restos porĉiame tio, kion li alportis al ILEI kaj al la mondo, ĉar lia ekzemplo ŝanĝis pozitive la vivsperton de la multnombraj personoj kaj organizaĵoj, kiuj havis la privilegion profiti de lia morale fidinda karaktero, larĝvida pensado, pacema kunlaborado, sincera amo al la homaro kaj persona amikeco.

Duncan Charters,
Prezidanto, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Dum la funebra ceremonio, en la nomo de ILEI la mesaĝon laŭtlegis Marija Belošević, sekretario de la Ligo.

TEKSTO EL LA MEMORKARTO PRI EDWARD SYMOENS:
„Edward, ni konis vin kiel homon, kiu havis tre bonajn rilatojn kun centoj da amikoj en la Esperanto-movado, sed precipe ni konis vin kiel homon laboreman, neniam lacan. Plukonstrui tion, kion vi iniciatis, estos sendube por vi la plej bela donaco. Tion ni promesas, Edward, tutkore. Dankon pro tio, kion vi faris por ni. dankon pro tio, kion vi instruis al ni."

Edward Symoens
La propedeŭtika valoro de Esperanto

1º En periodo, kiam la mondo vaste malfermiĝas, komunikado ne estas superflua lukso, sed nepra neceso. Lingvolernado sin trudas al ĉiam pli da homoj, sed ĝis nun la rezultoj de tiu instruado, laŭ plej diversaj enketoj kaj atestoj, tute ne estas evidenta nek kontentiga. Kial ne iri tute novan vojon, eĉ se tiu ŝajnas al multaj homoj nekutima, eĉ revolucia?

Ni bezonas lingvo-paradigmon, lingvo-modelon, kiu konsistigas enkondukon laŭgradan al ĉiuj esencaj gramatikaj, morfologiaj kaj semantikaj elementoj, al ĉiuj t.n. „universalia", „esentialia" (latinaj vortoj por universalaj trajtoj, ecoj, karakterizaĵoj; la esencaj ecoj, elementoj) uzeblaj en plej multaj lingvoj.

Ĝis antaŭ nelonge, oni konsideris la latinan - prave - kiel enkondukon al precipe la modernaj latinidaj lingvoj kaj al universala pensmaniero. Pro diversaj ecoj, ĝi helpas la gelernantojn kompari, dedukti, analizi, rezoni kaj liberiĝi el la pensmaniero de la gepatra lingvo.

Bedaŭrinde, la latina estas tre malfacila lingvo, regebla nur de limigita grupo de intelekte plentalentaj kaj motivitaj lernejanoj, kaj ĝi ne alportas solvon al la praktika komunika problemo. Pro tio kaj eble pro aliaj motivoj, ĝi multlande malaperis el la instruprogramoj, aŭ ĝia instruado estis reduktita al nur kelkaj horoj semajne, kiuj tute ne sufiĉas por ke ĝi ludu sian antaŭan edukan rolon. La tuja lernado de modernaj lingvoj anstataŭas, sen alia preparo, tiun de la latina.

2º Ni do bezonas alian paradigmo-lingvon, kiu kombinas la edukajn ecojn de la latina kun la postuloj de la moderna socio, kiu pro sia simpleco kaj relativa facileco (i.a. la foresto de senutilaj gramatikaj esceptoj) estu alirebla ankaŭ al malpli talentaj lernejanoj kaj aldone posedu la saman esprimkapablon kiel aliaj lingvoj.

Tia lingvo ekzistas: la internacia lingvo Esperanto, kiu dum sia pli ol centjara ekzisto plene maturiĝis en la sino de internacia diaspora komunumo

kaj laŭ natura, socia vojo evoluis de lingvoprojekto al aŭtonome funkcianta, vivanta kaj evoluanta lingvo, instrumento de supranacia komunumo.
Ofte ĝi estas nomita „la moderna latina", aŭ la „demokrata latina" kun referenco al la duobla rolo kiun dum multaj jarcentoj ludis la latina lingvo kiel neŭtrala translima „lingua franca" kaj KIEL ENKONDUKO AL LA LERNADO DE ALIAJ LINGVOJ. („Demokrata" kompreneble ne aludas pri la tavolo de intelektuloj, kiuj dum kelkaj jarcentoj uzis la latinan, sed pri la ebleco por pli larĝaj homgrupoj lerni kaj regi Esperanton nuntempe, laŭ niaj demokrataj konceptoj).

3º La fakto ke antaŭa lernado de Esperanto plifaciligas la postan lernadon de aliaj lingvoj, kiel faris la lernado de la latina, konsistigas la propedeŭtikan, t.e. la preparan, inican, enkondukan valoron de la Internacia Lingvo por poste elekti kaj lerni pli facile aliajn lingvojn.

Jam de multaj jardekoj instruistoj intuicie malkovris ĉi tiun kvaliton kaj diversloke kaj diversmaniere organiziĝis eksperimentoj por science pruvi tion. Esperanto estas „travidebla" lingvo, kvazaŭ rentgeno-foto, en kiu ĉiuj konsistigaj kategorioj, elementoj videblas, konkretiĝas: la tempo de la verboj, la gramatikaj kategorioj, la rilatoj inter la vortoj, la funkcioj en la frazo. Tiu „travidebleco" ne ekzistas en etnaj lingvoj, almenaŭ en la plej multaj.

La infano pere de Esperanto do senpene lernas kio estas substantivo, adjektivo, adverbo, preterito, ktp., ĉar ĝi vidas ilin dank' al la karakterizaj kaj senesceptaj finaĵoj. Kiam la nocioj „substantivo", „adjektivo" k.a. estos klare gravuritaj en la memoro kaj komplete asimilitaj, la lernanto pli facile povos ilin uzi en aliaj cirkonstancoj, en la studo de aliaj lingvoj, eĉ de la gepatra lingvo.

Dank' al la tekniko de kunmetado kaj derivado, kiujn la gelernantoj povas kaj devas grandskale apliki en Esperanto, ili eklernas malkovri semantikajn rilatojn inter la vortoj, eĉ se en la propra gepatra lingvo neniu simila rilato ekzistas; ili do akiras pli intiman komprenon pri la vortfarado kaj la vortsignifo. En multaj lingvoj la sama tekniko ekzistas, sed ĝi preskaŭ ĉiam estas kaŝita, ne tuj videbla, rekonebla.
Esperanto estas bonega enkonduko ankaŭ en la „internacian" vortaron por la studo de etnaj lingvoj pro la fakto ke la radikoj estas kiel eble plej internaciaj, ĉerpitaj el multaj kaj diversaj lingvogrupoj.

Pro la fakto, ke Esperanto estas lingvo kiu p e n s i g a s, ĝia studado disvolvigas aliajn, pli ĝeneralajn kapablojn: la kapablon observi, pripensi, rezoni, kompari, analizi, kunmeti, indukti, dedukti... Ĉi tiuj rapide disvolviĝantaj kapabloj utilas ankaŭ dum lernado de aliaj lingvoj; ili do estas transportataj ankaŭ al novaj lernsituacioj.

4º Ni tamen ne troigu! La propedeŭtika signifo de Esperanto estas reala, sed ligita al la kompetenteco de la instruistoj, la kvalito de la uzitaj metodoj kaj

lerniloj, kaj precipe la pozitiva sinteno kaj diligenteco de la gelernantoj mem kaj ilia motivado, lernvolo. Kia ajn estu la relativa facileco kaj la efektiva propedeŭtika valoro de Esperanto, temas pri kompleta lingvo, kiun oni povas komplete asimili kaj plene regi NUR per serioza studado, ekzercado kaj uzado.

Rimarko: Kiu interesiĝas pri ĉi tiu temo, trovas pli da informoj, i.a. bibliografion de 157 titoloj en la verko: *Edward Symoens: Al nova lingvopolitiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto. Eldonita ĉe Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1992.*, aŭ en la franca versio: *Apprendre des langues étrangères. Nouvelle approche à la valeur propédeutique de l' espéranto. Eldonita ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1994*

Edward Symoens ✝

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Protokolo

de la Komitatkunsidoj en Övik, Finnlando

30-a de julio - 3-a de aŭgusto 1995

I. Enkonduko

1.1. La sekretariino, Marija Belošević (M.B.), klarigas la voĉdonsistemon. Ĉeestas 29 voĉdonrajtuloj el sume 53 komitatanoj. • Post interveno de s-ino C. Dazzini estas decidite (jes: 20; ne: – ; sindeteno: 8) ke la itala delegito rajtas voĉdoni por San Marino.

1.2. La propono pri la protokolanto (Raymond Wylleman, Belgio) estas akceptita unuanime. • *Rimarkoj pri la protokolo 1994:* Hans ten Hagen (NL) proponas ke oni prezentu ĝin por aprobo. • Julian Hernandez Angulo (Kubo) petas ke ĝi ne estu legata komplete, ke ĝi estu nur aprobata. • S-ino Raita Pyhälä (SF) petas liston de la taskoj de sekciestro. • Bertil Andreasson (S) proponas ke oni aperigu la protokolon '95 en IPR.

1.3. Oni konsentas, pli frue komenci la komitatkunsidojn, je la 13^{30}h. • Pri la protokolo '94: Ĝi troviĝos en la kunvenejo por antaŭa surloka legado antaŭ la sekvanta kunsido. • Stefan MacGill (smg – H) disdonas la raporton pri eldonado.

1.4. *Starigo kaj konfirmo de necesaj komisionoj kaj laborgrupoj*: • pri elektoj: E. Symoens (B) kaj Ana Montessinos de Gomis (GB) restu por la konstanteco, • pri rezolucio 1995, sendota al Unesko, • pri la propedeŭtika valoro de E-o: ĝenerala akcepto de laborgrupo: Dorothy Holland (USA), Nora Moerbeek (NL), Raymond Wylleman (B).

1.5. *Protokolo '94*: R. Moerbeek (protokolinto) parte indikas la tro multajn erarojn. Poste la protokolo '94 tamen estas aprobita. S-ino van der Horst (NL) proponas aĉeti printilon por la ILEI sekretariejo por faciligi kaj plibonigi la sekretarian laboron.

2. Raportoj

2.1. *Raporto de la sekretariino*: nur 10 enketiloj revenis; 793 anoj, 36 sekcioj. La raporto, voĉlegita de M.B., estos sendata al la sekciestroj kune kun la protokolo '95 kaj koncize aperos en IPR. Hans ten Hagen kaj Rob Moerbeek (NL) proponas ke estonte aperu la raporto en IPR antaŭ la konferenco. M.B. konsentas, kondiĉe ke IPR regule aperas. • S-ino C. Dazzini esprimas sian bedaŭron pri la agado en 1994.

2.2. *Raportoj de la komisiitoj.*

– *pri eldonado*: [pri tio raportis *smg*, la koncernuloj ricevis ĝin]

– *Juna amiko*: *smg* emfazas ke la ĵurnalista asocio TEĴA okazigis enketon, en kiu nur du fakaj revuoj estis taksitaj bonaj: *Juna amiko* kaj IPR. Notindaj abonnombroj por *JA*: Brazilo: 99, Italio: 59. Li substrekas ke ĉiu eŭropa abono signifas ke 3 ĝis 4 abonoj povas esti sendataj al nepagipovaj landoj (= subvenciaj abonoj). S-ino Charlotte Kohrs (USA) skribe promesis enhavan kunlaboron en ĉiu numero, plus financan subtenon. Bertil Andreasson rimarkigas ke la deficito de 25 % (ne nur 10 %) havas radikojn en antaŭaj jaroj.

Rimarkoj/Komentoj: • Se ĉiu lernejo aĉetus J.A.-n po lernanto, tiam eblus elekti la plej avantaĝan tarifon. • *Smg* klarigas la redaktorajn la problemojn de *Internacia Pedagogia Revuo* kaj la nunan solvon, kaj priskribas la personecon de la nova redaktoro Jozefo Németh. Li alvokas al "freŝaj", valoraj artikoloj. • *Tendaraj tagoj*: La vendo de la restanta stoko estas pura gajno. • *Kunvojaĝu*: La verko de Paŭlo Gubbins portas prestiĝon al ILEI, sed bedaŭrinde neniun gajnon. •*Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado*: ne bonaj financaj perspektivoj; tamen subvenciata. • *Kantoj kaj fantaziaĵoj por infanoj*: estas unu el la malmultaj tiaspecaj eldonaĵoj en Esperantio. Mendoj eblas rekte ĉe ILEI en Budapeŝto: la sendkostoj inkluzivas kaj pagojn oni faru ĉe UEA-konto nome de ILEI. • Eblaj estontaj verkoj prezentiĝas. La aplaŭdo de la ĉeestantaro signifas „tre dolĉa komento", konkludis *smg*.

pri Unesko: M. B. raportas: Nia reprezentanto ĉe Unesco estas F. Lo Jiacomo (F) kaj li regule informas pri la kontaktoj kaj partopreno en la kunsido de UNESCO. S-ino C. Dazzini intervenas por prezenti la italan projekton Fundapax kiu ricevis Unesco-subvencion.

La komisiito pri lernejaj konkursoj, S-ro Géza KURUCZ, meritas apartan gratulon pro la modela agado. Raporto en IPR.

2.3. *Raporto pri januaro-junio* '95: M.B.: ĝi aperis parte en IPR 95/2.

• Eŭropa E-Kongreso en Parizo dum Pentekosto: ILEI-kunsido kun 42 partoprenintoj daŭris 55 minutojn. (!) • ILEI-estrarkunsido en Hamburgo (IPR 95/2) • korespondado, ekzameno - raporto M.B. •"*Eventoj*" aperigas novaĵojn pri la ILEI-agado • *Gvidlibro por ekzamenoj*: UEA decidis pagi la kostojn; ILEI prizorgu la enhavon; ankoraŭ duboj pri la supera ekzameno.

• *Rimarko*: s-ro L. Mee (GB) opinias ke la regularo de la ekzamenoj publikigendas, eventuale en IPR.

3. Financoj

3.1. *Financa raporto '94: aldono 2* – Hans ten Hagen faras kelkajn librotenajn demandojn al kiuj Bertil Andreasson respondas kontentige. Temas i.a. pri la valoro de la librostoko.

3.2. Post la voĉlegado de la raporto de la kontrola komisiono la ĉeestantoj ĝenerale akceptas la financan raporton. Notindas la sindeteno de la kasisto.

3.3. *Financa plano '95*: B. Andreasson opinias ke ne plu utilas, la okan monaton, pridiskuti financan planon por la jaro 95, precipe ĉar ne estas/-os grandaj eventoj. Li mencias la UEA-subvencion de 3000 NLG. La sekcioj estas petataj pli akurate pagi la membrokotizojn al la kasisto, kiu memorigas la pagdaton de la 31-a de marto. • La konteltiroj de UEA malfrue alvenas ĉe la ILEI-kasisto kaj ankaŭ neklaraj mencioj pri pagoj. Oni atentu pri tio.

3.4. *Membrokotizo*: 20 NLG, ankaŭ por 1996, ĉar granda(j) salto(j) ne estas antaŭvidebla(j) en la proksima estonto. • *Smg* intervenas, dirante ke tiom longe ke la laboro estos farata de volontuloj, la kasisto pravas sed alie oni tamen pripensu altigon de la membrokotizo. Tiam estos ankaŭ utile paroli pri apartaj kotizoj jam pridiskutitaj en la estraro: por (mal)junuloj, senlaboruloj, handikapuloj...

3.5. *Propono financa plano '96.* B.A. prezentas la buĝeton:

Rimedoj	**SEK**	**Kostoj**	**SEK**
membrokotizoj	52000	IPR	45000
libroj	500	afranko/tel.	5000
koleghelpa konto	500	presaĵoj, kopiado	4000
fond. Szerdahelyi	500	estraro	14000
konferenco	2000	honorarioj	9500
kompenso UEA	13000	Juna amiko (nete)	5000
eldonado (nete)	10000	bankkostoj	500
ekzamenoj (nete)	4000	kotizo UEA	2000
interezo	5000	Azia agado	1000
donacoj	1000	lukostoj	2000
	88500		**88500**

• B.A. rimarkigas ke eblas pagi al Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno, ĉar ILEI tamen devas pagi por IPR al Grafika Centro.

3.6. *ILEI-fondaĵoj kaj kasoj*: B.A. informas pri la fondaĵo Erika Linz (Vieno), starigita en Lokarno 1973, celanta subvencii junajn e-istojn: ne estas la propraĵo de la ĝenerala ILEI-kaso, ĝi troviĝas en speciala kaso.

Pri fondaĵo aŭ kaso: la estraro decidu ĉu estas ekzamena, konferenca, ĝenerala, eldona, ktp. fondaĵo aŭ kaso.

4.Trijara laborplano por 1995-97

La sekciestroj ricevis ĝin. [*Ĝi aperis en la 95/3-a numero de IPR*]

Voĉlegado, diskuto, akcepto: por: 24; sindeteno: 5.

5. Plano por 1995: laŭmonata kun respondeculoj

6. Funkciuloj

6.1. *Elekto-komisiono*: vidu 1. 4. *Ŝangoj en la estraro* : Pro nesufiĉa kvorumo en Seŭlo 1994, tiu temo nun staras sur la tagordo. • S-ino Montessinos prezentas *la elirantojn*: Prof. R. J. Glossop, D-ro So Jinsu, Prof. Zhang Danchen; • *la novajn kandidatojn*: Brunetto Casini, Italio; Atilio Orellana Rojas, Argentino; Marin Bacev, Bulgario; • *rekandidatas*: R. Glossop kaj Zhang Danchen. • Rezulto de la elekto:

M. Bacev	11 voĉoj
B. Casini	24*
Zhang Danchen	16*
R. Glossop	10
A. Orellana	24*

• **Elektiĝis**: B. CASINI, ZHANG DANCHEN, A. ORELLANA ROJAS.

• R. Glossop elektiĝis kiel estrara komisiito. Taskojn la estraro dividos poste.

6.2. La listo de sekciestroj kaj reprezentantoj en IPR aktualiĝos, Japanio aldoniĝos.

6.3. F. Lo Jiacomo estas la reprezentanto ĉe Unesko, d-ro Maŭro La Torre (Italio), komisiito pri terminologio.

7. Honoraj Membroj

La estraro proponas nur unu kandidaton: S-ro E. SYMOENS. La 26-an de junio 1995 s-ro E. Symoens skribe akceptis esti kandidato. Unuanime akceptita.

8. Novaj Sekcioj – Perspektivoj pri Aŭstralio.

9. Regularoj

9.1. *Konferenca regularo*: kopii tiun de UEA, la organizanta sekcio nepre havu ĝin. Menciindas: se estas deficito, tiun kovru ILEI. Kotiza limo estu proponita al la organizanta sekcio. Komisiono preparos regularon prezentotan en 1996. Proponas kunlabori: Zsuzsa Barcsay, Atilio Orellana kaj Mila van der Horst. • Demando: Kiel estas farita la kontrolo de la librotenado de la organizanta sekcio? - B.A. faras tion (kaj antaŭvidas ioman profiton por '95). •

Sugesto de Nora Moerbeek (NL): Starigi konferenco-estraron apud la asocia estraro, kiel ĉe LIBE.

9.2. *Elekto-regularo*: • S-ro E. Symoens jam proponis sin por prepari ĝin por la konferenco '96. • S-ro L. Mee volas kunlabori en necesa ĉiujara „forumo". • S-ino C. Dazzini mencias ke ŝi posedas la statuton. Sekvas diskuto, i.a. pri San Marino. • *Smg* intervenas : oni ne hodiaŭ pridiskutu la sidejon.

9.3. Regularo „La plej aktiva Landa Sekcio (L.S.)": *Rimarkoj*: Hans ten Hagen proponas ŝpari ĉiujare sumon por pagi la premion = nova kaso. • Ni bone konu la agadon de la sekcioj. • La sekcioj preparu jaran superrigardon kaj sendu ĝin al M.B. • B.A.: Tia intersekcia konkurso estas malfacila pro la kriterioj. • Zs. Barcsay: Ne "la plej bona" pro la malsamaj situacioj. • Julian H. Angulo: Kiu elektas la plej aktivan L.S.? • Sekvas konfuza diskuto pri la demando ĉu daŭrigi aŭ ne? Tamen estas decidita (3 sindetenoj): dum la venontjara komitatkunsido oni decidos ĉu voĉdoni en '96. • La sekcioj sendu la necesajn raportojn al la sekretario.

10. Postaj konferencoj kaj aliaj pedagogiaj aranĝoj

10.1. *Ĉeĥio, 1996*: loko: TÁBOR, 90 km for de Prago. Kontaktoj kun TILIO, kiu organizos; la kongresejo trovigos apud la logejoj; kontrakto estu subskribita aŭtune; por ĉiuj 40 personoj estos 1 respondeculo; la prezo ne estos tro multekosta. • S-ino Dazzini: Ĉu ekzistas en tiu loko iu faka grupo pri instruado, eduksistemo...? • Temo: Estos ankaŭ la temo por la Tago de la Lernejo. El la temoj proponitaj estas elektita (1 sindeteno): *"Rimedoj por bona lernado kaj memlernado de E-o."* • *Rimarko*: ni planu starigi laborgrupojn, ekz. „Mazi-uzantoj, ktp.

10.2. *Aŭstralio, 1997*: loko: Max Wearing prezentas la 3 eblecojn:

1) Southport, Qeensland: taŭga ejo, sed pro la loka lerneja programo, la ILEI-konferenco estu antaŭ la UK, 2) apud la rivero Mary, kun eblecoj konatiĝi kun la enlanda faŭno, 3) Adelajdo, 80 km sude de A.: pli interesaj prezoj (2/3 de Southport), jam provizora kontrakto. • Ĝenerale: la vivkostoj estas duono de tiuj en Finnlando. Temo estu proksima al „Multkultura Aŭstralio en mult-kultura mondo".

10.3. *Postaj konferencoj*: 1998: Francio (ne en Parizo) Ni decidos dum la venontaj jaroj. 1999: Germanio

10.4. *Internaciaj metodikaj seminarioj* (IMS): En 1991 estis la lasta, bedaŭrinde. • La hungaroj sentas la bezonon pri IMS por la propraj studentoj. • Propono: 1997 en Hungario. 1996: Ĉinio • Nederlando, HEERLEN, 15-17-a de marto 1996. • Rimarko: Regiona IMS estas interesa por kontakti pli da homoj.

10.5. *Gimnazioj*: Gimnazioj estas daŭrigindaj (Zs. Barcsay kaj B.A.). • Julian H. Angulo: La kongreslando varbu enlandajn partoprenantojn por la gimnazio. • Oni pli praktike aranĝu fakajn metodikajn momentojn. • Barcsay: La

nederlanda asocio subvencias la partoprenantojn. Ŝi alvokas aliajn sekciojn fari la saman. • Oni aranĝu lingvan kurson apud la gimnaziaj fakoj. • *Smg*: Antaŭvideblas pli multnombra ĉeesto en le gimnazio en Ĉeĥio. • Mee: La plej bona loko por komencantoj-kursoj estas Grésillon, Francio. • Max Wearing ne komprenas kial mankas varbaj agadoj de UEA kaj de ILEI okaze de la kongresoj. Tio tamen devus rezulti en kresko de kursanoj. • M. B. emfazas ke mono estas la ĉiama problemo.

11. Rilatoj kun aliaj E-organizaĵoj

11.1. *UEA*: M. B. atendas proponojn. Ĉar la nova prezidanto de UEA diris ke instruado estu je la unua loko, oni esprimas la deziron ke de tie venos nova vento.

11.2. *Propono*: A. Ritamaki proponis al la TEJO-estraro elekti komisiiton pri infanoj, kiu estu ligo inter niaj du asocioj. • Danio petis ILEI venontjare organizi la seminarion. Hans ten Hagen kredas ke TEJO povus instigi gejunulojn por partopreni en la Gimnazio.

11.3. *LIBE* 1996 estos en Ĉeĥio. M. B. kontaktos Rob Moerbeek pri ebla ekzamensesio dum la UK en Prago. Ni esploru pri aliaj eblecoj por kunlabori.

11.4. *IEI*. S-ino van der Horst: Mazi, apud la lernado, povas esti uzata varbcele. Oni sciu la spertojn pri la uzo de la vidbendo.

11.5. *Aliaj fakorganizoj*: Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto (Jarlibro p. 67.) invitas instruistojn kunlabori. Geonkloj Esperantistaj (Jarlibro p. 75.) • ILEI provos starigi kontaktojn kun aliaj E-organizoj, kiuj okupiĝas pri edukado.

11.6. *Esperanto-centroj*: mondonacoj petitaj: estu kunlaboro kun Kaunas (Litovio), Estona E-Instituto (s-ro Hromov).

12. Ceterajoj

-Alvoko por aboni „Eventoj" en kiu aperas informoj pri ILEI, pri Mazi,...

Raymond Wylleman
Aug. Vermeylenstr. 65., BE-8400 Oostende,Belgio

INDEKSO POR LA JARKOLEKTOJ DE IPR 1991-1995

(Indekso 1980-90 aperis en numero 1/91)

1. ANDREASSON: Evoluo de la membraro de ILEI 1984-1990 91/2. p.38-39.
2. ANDREASSON, Bertil: Financa raporto 1991 92/2. p.27-28.
3. ANDREASSON, Bertil: Financa raporto de ILEI por 1990 91/2. p.36-37.
4. ANDREASSON, Bertil: Financa raporto pri 1992 93/2. p.34-36.
5. ba/smg: Buĝetoj de ILEI: 1991-1993 92/3. p.40.
6. ba: Fondajo Szerdahelyi 91/1. p.36.
7. ARNAUDOV, Petko: Leciono pri Matematiko 92/3. p.24-28.
8. BARANDOVSKA: Enkonduka lernolibro de interlingvistiko 95/1. p.12-15.
9. BARANDOVSKA-FRANK: Methodus Lingvarium Novissima 93/2. p.1-7.
10. BARCSAY Zsuzsa: La 3-a Gimnazia Semajno de ILEI 95/4. p.3-5.
11. BARCSAY, Zsuzsa: Plurlingvismo, najbara dulingvismo... 91/2. p.39-40.
12. BARCSAY, Zsuzsa: 9-a Internacia Metodika Seminario 91/2. p.11-13.

13. BARCSAY, Zsuzsa: Internacia kaj amikeca 92/3. p.11-13.
14. BARCSAY, Zsuzsa: Invito al la ILEI-Gimnazio 91/4. p.19-20.
15. BARCSAY, Zsuzsa: Konferenca kaj Gimnazia Komuniko 92/1. p.29-30.
16. BARCSAY, Zs.: Tekstoprilaborado por elformi produktivajn komunikajn kapablojn 93/4. 5-12.
17. bzs: Deka Internacia Metodika Seminario en Estonio 93/4. p.17-18.
18. BELOŜEVIĈ, Marija: ILEI kunsidis en Hamburgo 95/2. p.33-34.
19. BELOŜEVIĈ, Marija: Landaj sekcioj de ILEI en 1992 93/3. p.24-25.
20. BELOŜEVIĈ, Marija: Landaj sekcioj de ILEI, raportoj 92/3. p.29-31.
21. BELOŜEVIĈ: Novaĵoj de la 78-a UK kaj 27-a ILEI-konferenco 93/3. p.17.
22. mb/smg: Kalendaro de pedagogiaj aranĝoj por 1994 93/4. p. 16.
23. mb: Ekzamenoj, UEA estrarkunsido, Tago de la Lernejo 95/2. p.28-29.
24. BIJLEVELD, May: Instruu paroli! 92/2. p.14-15.
25. bis: Buĝetoj ILEI; kurantaj novaĵoj; IPR en 1992 91/4. p.34-36.
26. BISHOP, Jennifer R.: EKPAROLI
27. BLANKE, Detlev: Aktoj de la Internacia Lingvistika Kongreso 92/1. p.17.
28. BORMANN, Werner: Intern. Kongr. de Instruistoj pri Fremdlingvoj 94/1-2. p.38.
29. BOURLOT, Carlo: Raporto pri la enkonduko de la I.L-o en italan bazan lernejon 94/3. p.21-32.
30. CHARTERS, Duncan: Intensiva kurso por instruistoj 92/4. p.17-18.
31. CHARTERS, Duncan: La propedeŭtika valoro de Esperanto 95/2. p.1-3.
32. CHARTERS, Duncan: Mesaĝo por 1994 kaj plue 93/4. p.1-4.
33. CHARTERS, Duncan: Raporto pri la kongresa temo de UK 93/3. p.20-23.
34. CHARTERS, Duncan: Salutmesaĝo al la 28-a Konferenco de ILEI 94/3. p.1-5.
35. CHARTERS, Duncan: Salutvortoj... por la Finnlanda Konferenco 1995 95/3. p.1.
36. CHARTERS, Duncan: Trejnado por E-instruado: kio plej gravas? 93/1. p.1-11.
37. CORSETTI, R., TAESCHNER, T.: Kiel trilingva infano lernas distingi inter lingvoj 92/3. p.1-10.
38. DAHLENBURG, Till: Densa programo en bonetosa nordo 91/3. p.1-2.
39. DAHLENBURG, Till: *SZANSZER: Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* (rec.) 94/4. p.26-28.
40. DÖRR, Josef: Baza vortprovizo de E-o cele al instruado 94/1-2. p.21-25.
41. ERTL, István: Recenzo. 92/1. p.21-23.
42. es/smg/mj: Arbara etoso stimula por labor-kolektivo 91/1. p.26-28.
43. FEHÉR Miklós: Instruado per poemoj 95/4. p.15.
44. FETTES, Mark: Monda Kunagado stimulas edukadon 93/1. p.29-30.
45. FISCHER, Rudolf: La jusa enkonduko de fremdlingva instruado en la elementajn lernejojn de Gemanujo... 91/3. p.17-22.
46. FORSMAN, Lars: Karlskoga komunikas 91/4. p.24.
47. FRANK, H.- BARANDOVSKA, V.: Lernplifaciligo pro antaŭmetitaj lingvokursoj 91/4. p.11-15.
48. FRANK, Ines: Lingvo-Orientiga Instruado en Oberndorf... 95/4. p.17-18.
49. MacGILL, Stefan: Aserti sed ne forkuri (repliko). 92/2. p.33-34.
50. MacGILL, Stefan: Demandoveke tra la Manifesto 91/1. p.23-24.
51. MacGILL, Stefan: Ekzamenoj atingas kvin kontinentojn 91/1. p.29-32.
52. MacGILL, Stefan: La novaj laborорganoj de la Ligo 91/3. p.9-11.
53. MacGILL, Stefan: Instruista trejnado nia prioritato 92/4. p.1-3.
54. MacGILL, Stefan: La aŭkcio: simpla aŭskulta kompreno 95/3. p.16-19.
55. MacGILL, Stefan: La debato pluiras - sed unuflanke 92/4. p.31-33.
56. MacGILL, Stefan: Manifesto sub lupeo 91/2. p.30-34.
57. MacGILL, Stefan: Nova ondo de lernolibroj 94/4. p.1-4.
58. MacGILL, Stefan: Nova prezidanto, Kontrakto kun Eventoj 93/3. p.18-19.
59. MacGILL, Stefan: Pesi du jarojn - de Voss ĝis Valencio 93/4. p.23-28.
60. MacGILL, Stefan: Protokolo de la ekzamenoj 1989-91 92/1. p.26-28.
61. MacGILL, Stefan: Raporto pri la estrarkunsido..(marto 1993) 93/1. p.30-35.
62. MacGILL, Stefan: Sed kia estas la mondo de lingvoj? 91/1. p.21-22.
63. MacGILL, Stefan: Skemo por la intensiva kurso por instruistoj92/3. p.21-23.
64. MacGILL, Stefan: Tri tabuaj demandoj 91/4. p.1-7.
65. MacGILL, Stefan: Tubero en numero kaj fermaj vortoj 94/3. p.36.

66. smg/km: Novajetoj, Recenzoj, Ekzamenoj, Kalendareto 93/3. p.32-34.
67. smg/sm: *SMIDÉLIUSZ, Katalin, Ĉu vi aŭdis, ke...* (Recenzo) 93/2. p.24.
68. smg: (trad.) Lingvo-politiko en tri aziaj landoj 92/2. p.16-17.
69. smg: *BULTER, Montague C.: Step by Step in Esperanto* (recenzo) 92/3. p.34.
70. smg: Celaro por Internacia Pedagogia Revuo 94/4. p.33-34.
71. smg: Edukado por la 21-a jarcento (raporto de Unesko) 92/4. p.16.
72. smg: Ekzamenoj UEA/ILEI: Kvin jaroj da intensa laboro 93/4. p.31-36.
73. smg: *GUBBINS, Paul: Kunvojaĝu* (recenzo) 94/4. p.16-20.
74. smg: ILEI Labortable: la eksteraj rilatoj en Eŭropo 92/3. p.37-39.
75. smg: Kalendaro de aranĝoj aŭg-dec. 1993 93/2. p.32.
76. smg: *KOFFI, Gbeglo: Mi vizitis grandan urbon* (recenzo) 92/3. p.34.
77. smg: Koncize ni notas (mallongaj raportoj) 91/3. p.42-44.
78. smg: Konkludoj pri la sekciaj raportoj kaj ceteraj sekciaj novajoj 91/2. p.25.
79. smg: *La ŝalmisto de Hamelin* (recenzo) 92/3. p.36.
80. smg: Laste aperis. *GLOSSOP, Ronald J., Monda Federiĝo?...* 93/2. p.9.
81. smg: Okulume tra niaj sekcioj 93/2. p.22-23
82. smg: Plene kaj idilie ni konferencis 95/3. p.2.
83. smg: Raporto pri la kurso en Barlastono 1995 95/3. p.20-21.
84. smg: Reagoj 95/4. p.23-24.
85. smg: Recenzoj 92/4. p.35-37.
86. smg: *SYMOENS, Edward: Al nova internacia lingvo-politiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto.* (Recenzo) 93/2. p.13.
87. smg: Telegrame el Berlino: Raporto pri la estrarkunsido 93/4. p.14.
88. smg: Tigre aŭ pigre al lingvo-lernado? 95/2. p.33.
89. smg: *VILISICS-FORMAGGIO: Ludu kun ni (1)* (recenzo) 94/4. p.5-12.
90. GLOSSOP, Ronald J.: Esperanto kiel unua fremda lingvo 92/3. p.16-20.
91. GLOSSOP, Ronald J.: Ferma Parolo kaj Rezolucioj de la Konferenco94/3. p.6-8.
92. GLOSSOP, Ronald J.: Konferenca raporto pri Bratislavo 92/3. p.11-13.
93. GLOSSOP, Ronald J.: Pensoj post la 41-a jarkongreso de ELNA 93/3. p.28.
94. GOLDEN, Bernard: Komplika transitiveco en E-o... (I-II.) 95/1. p.1-11.
95. GOLDEN, Bernard: Komplika transitiveco en E-o...(III.) 95/2. p.16-21.
96. GOLDEN, Bernard: Nereala taksado de la nombro de esperantistoj en la mondo 92/2. p.29-33.
97. GOLDEN, Bernard: *Sárközi, János: Adamo kaj Eva.* (Rec.) 93/2. p.15-16.
98. GOLDEN, Bernard: Varioj de prononco de Esperanto 93/1. p.19-27.
99. GRÖTZNER, Armin: Renkontiĝo, kun la bavara eduka min. 93/2. p.25-26.
100. GUBBINS, Paŭlo: Pri la Esperanta participo... 94/3. p.9-15.
101. HARTRIDGE, Les: Post la senpaga koresponda kurso 95/1. p.32.
102. HORST-KOLINSKA Mila v.d.: Ĉu eblas produkti vid-bendan kurson? 91/2. p.10.
103. HORST-KOLINSKA Mila v.d.: Ĉu la Cseh-metodo malmoderniĝis? 93/2. p.8-9.
104. HORST-KOLINSKA Mila v.d.: Kiel instrui por ne perdi kursanojn? 92/1. p.30-32.
105. HORST-KOLINSKA Mila v.d.: Konkurso por vidbenda instru-kurso 91/4. p.18.
106. HORST-KOLINSKA, Mila v.d.: Mazi proksimiĝas 94/4. p.23.
107. HORST-KOLINSKA, Mila v.d.: TV-kurso en Esperanto 94/1-2. p.42-43.
108. JANSEN, Sjak: Vizitu la Talento-lernejon! 94/1-2. p.28-30.
109. KAMAĈO, Georgo: *Gubbins: Kunvojaĝu* (recenzo) 95/4. p.25-26.
110. KAPISTA, Terezija: La unua renkontiĝo kun Mazi 95/3. p.15.
111. *KARMI, Ĥana: La senmorta piano. Redaktis: Josef Murjan* 93/2. p.33..
112. KERESZTHEGYI Tivadar: Intensive - de mateno ĝis malfrue... 92/4. p.4.
113. KIRSCH János: Ĉu paĉja lingvo? - REF '95 95/3. p.23-24.
114. KLAG, Walter: *EMBA: Maria kaj la grupo* (recenzo) 92/3. p.35.
115. KLAG, Walter: *U. Matthias: Fajron sentas mi interne* (recenzo) 92/3. p.35.
116. KLAG, Walter: Ĉu funkcias la angla? Rigardo tra la .... 92/2. p.22-23.
117. KLAG, Walter: Recenzoj (*Tiu toskana sept., Fazodiagramoj*) 91/2. p.28.
118. KLAG, Walter: Testu vian scion pri la angla lingvo 91/1. p.19-20.

119. KOLKER, Boris: Vojaĝo en Esperanto-Lando (ĉerpajoj) 93/2. p.10-12.
120. KOUTNY, Ilona: E-fako por eksterlandanoj en Univ. Eötvös 93/1. p.18.
121. KOVÁCS Márta: Adiaŭaj vortoj 94/4. p.35.
122. KOVÁCS Márta: Indekso aŭtora ... de IPR 1980-1990 91/1. p.10-17.
123. KOVÁCS, Márta: Postparolo de la nova redaktoro. 92/1. p.40.
124. KOVÁCS, Márta: Pri la sekcioj de ILEI en 1990 91/2. p.22-24.
125. KOVÁCS Márta: Temindekso por ... IPR 1980-1990 91/1. p.18.
126. km: Praktikaj praktikoj 93/3. p.11-15.
127. km: Tra la sekcioj 93/4. p.29-30.
128. KURUCZ Géza: Ekzerco por evoluigi la aŭskulto- aŭ la lego-kapablon 94/1-2. p.49.
129. KURUCZ Géza: Internacia konkurso pri modela E-parolo 92/4. p.30.
130. KURUCZ Géza: Kiel mezuri lingvoscion? 95/4. p.15-17.
131. KURUCZ Géza: Konkursoj kiujn aprobis la praktiko (I.) 95/1. p.16-18.
132. KURUCZ Géza: Konkursoj kiujn aprobis la praktiko (II.) 95/2. p.30-32.
133. KURUCZ Géza: La unua leciono 95/3. p.14-15.
134. KURUCZ Géza: Lernejaj konkursoj 94/1-2. p.39-41.
135. KURUCZ Géza: Por IPR kun pli vasta horizonto 94/4. p.31.
136. KURUCZ Géza: Pri la uzo de substantivaj participoj 95/4. p.27-29.
137. KURUCZ, Géza: Esperanto-konkurso por lernejano 91/3. p.12-13.
138. KURUCZ, Géza: Gramatikaj-leksikaj ekzamenoj 93/1. p.14-15.
139. KURUCZ, Géza: Ideoj lige kun la demandoj de IPR 1/91 91/3. p.6.
140. KURUCZ, Géza: Io, kio mankas en nia laboro 91/4. p.23-24.
141. KURUCZ, Géza: Kial malaperas multaj varbitoj? 93/3. p.16.
142. KURUCZ, Géza: Komisiono pri konkursoj 92/2. p.24.
143. LA TORRE, Maŭro: Instruika eksperimento esp^2 95/2. p.13-15.
144. LA TORRE, Maŭro: Personigitaj Malĉeaj Instru-sistemoj 93/3. p.1-8.
145. MALACION, Aleksandr: Devigan instruadon aŭ realan vojon 95/1. p.20-21.
146. MALOVEC, Miroslav: Deklaracio de rajtoj de Eŭropa lernejano 91/2. p.24.
147. MALOVEC, Miroslav: Kiel komunikos la unuiĝinta Eŭropo? 91/4. p.16-18.
148. MATTHIAS, Ulrich: Ideoj por konversacioj 95/4. p.12-13.
149. MATTHIAS, Ulrich: Propono por la lingvopolitiko 92/4. p.28.
150. MIRSKA, E., KOVÁCS, M.: Rezultoj de la enketilo pri E-instr. 93/2. p.27-30.
151. MOLNÁR, Ágnes: La lernejo laŭ Komenio (konferenca temo) 92/2, p.1-4.
152. MOLNÁR, László: La mondo per bildoj (konferenca temo) 92/2, p.5-8.
153. NAGY, Edit: Kialoj por lerni Esperanton 94/1-2. p.7-20.
154. NEMEC, Vladimir: Komputoraj porlernejaj programoj 93/3. p.15-16.
155. NÉMETH, József: Alvoko al la sekciestroj 95/3. p.36.
156. NÉMETH, József: Germanaj esperantistoj en Hungario (interv. kun s-ro Rössler) 95/1. p.29-31.
157. NÉMETH, József: La 10-aj Esperantaj Pedagogiaj Tagoj 95/1. p.27-29.
158. NÉMETH, József: Mikro-intervjuo kun Ursula Fiebert 95/3. p.22-23.
159. NÉMETH, József: Postparolo de la nova redaktoro 95/1. p.36.
160. NGO, Chan Ly: Jubileo de agadplenaj jaroj (el Vjetnamio) 91/3. p.16.
161. NOIREAU, Françoise: La testudo parolanta 95/4. p.13-14.
162. OLSSON, Ole: Infanoj trans la limojn; alvoko de la eks-kasisto 92/1. p.18.
163. OLSSON, Olle: Stipendio por infanoj 95/2. p.35-36.
164. ONET, Ionel: Primi pasi in Esperanto (rumana lernilo) 93/2. p.23
165. ORELLANA ROJAS, A.: Rondvojaĝo en sudamerikaj landoj 93/3. 29-31.
166. OU YANG, Dong Liang: Kreeca edukado 93/1. p.12-14.
167. PETIK János: Pri la neceso de kunagado 94/1-2. p.46-48.
168. PETIK János: Serve de altaj pretendoj 95/4. p.29-34.
169. PIRLOT, Germain kaj SADLER, Mike: Reagoj 92/1. p.24.
170. PITT, Arnold: *AMERY, Heather: Mil unuaj vortoj...*(rec.) 94/4. p.24-25.
171. *PITT, Klaas, STILMA, Bert: Kvarjarcentoj, Komenio.* Tradukis Barcsay Zsuzsa. (Recenzis: d-ro Till Dahlenburg) 93/2. p.14-15.

172. PYHÄLÄ, Raita: La Finnlanda eduksistemo 95/4. p.1-3.
173. RÁTKAI, Árpád: Kiuj kaj kiom da lingvoj denaskaj? 91/4. p.8-10.
174. ROSBACH Johan Hammond: La lingvo kiel ilo 94/1-2. p.26-28.
175. ROSBACH, Johan Hammond: Instrui kaj lernigi 93/3. p.9-10.
176. ROSBACH, Johan Hammond: Lernolibroj sub lupeo 92/4. p.20-25.
177. RÖSSLER, Franz-Georg: *Tradukarto kunlaboriga* (recenzo) 95/4. p.24-25.
178. RULOFIDO, Petro: La Malfacila Esperanto 95/4. p.20-22.
179. SADLER, Mike kaj PIRLOT,Germain: Reagoj 92/1. p.24.
180. SCHIER, Norbert: Lernejo kiel praktikadkampo de la soc.pedagogio 92/1. p.1-11.
181. SHAO Rong: Ĉu „epiteto" aŭ „a-frazero"? 92/1. p.9-13.
182. SMIDÉLIUSZ Katalin: BEKunu,..(Intervjuo kun D. Keefe I.) 95/4. p.5-12.
183. SMIDÉLIUSZ Katalin: La propedeŭtika valoro konkrete 95/2. p.4-12.
184. SMIDÉLIUSZ Katalin: Nova vidbend-serio de IEI 95/1. p.19-20.
185. SMIDÉLIUSZ, K.: Enkondukaj pensoj al la Cseh-jubileoj 94/1-2. p.1-6.
186. SMIDÉLIUSZ, Katalin: Instruado de Esperanto en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely 91/4. p.21-22.
187. STOICA, Angela: Reviviĝo en Rumanio. Raporto kaj aliĝpeto 92/1. p.32.
188. STROBL, Katalin: Apliko de la komunika metodo...(I.) 91/1. p.1-9.
189. STROBL, Katalin: Komunika Esperanta Lernolibro (II.) 91/2. p.14-21.
190. STROBL, Katalin: Apliko de la komunika metodo...(III.) 91/3. p.33-41.
191. SYMOENS, E.: *Bacev, Marin: Kalendaro instrua 1993*. (Rec.) 93/2. p.33.
192. SYMOENS, Edward: Tri jaroj en la bilanco (1988-91) 91/3. p.23-32.
193. TANGERUD, Odd: Po - distribua prepozicio 91/2. p.27.
194. TANGERUD, Odd: Retrospektiva rakontado kaj pluskvamperf. en la Z-a Lingvo 92/1. p.13-17.
195. VERWOERD, Ton: Amikeco trans la markolo 93/2. p.21.
196. VILISICS-FORMAGGIO, E.: Interkompreniĝi, sed kiel? 92/4. p.5-15.
197. WACHA, Blazio: Disĉiple kaj memstare - intervjuo kun Koutny Ilona 91/2. p.1-6.
198. VAHA, Blazio: Fantazie kaj didakte 95/3. p.7-14.
199. WANDEL, Amri: Perkomputora Instruado de Esperanto 91/3. p.14-16.

Nesignitaj/redakciaj verkoj

200. 26-a Internacia Konferenco de ILEI (aliĝilo) 91/4. Suplemente.
201. 27-a Konferenco kaj 2-a Gimnazio de ILEI (aliĝilo) 93/1. Suplemente.
202. 28-a ILEI-Konferenco; ĝisdatigaj informoj 93/4. p.13.
203. 28-a Konferenco kaj 3-a Gimn. de ILEI: Informilo, aliĝilo 93/2. p.17-20.
204. 29-a Konferenco de ILEI en Övik, Finnlando. Informoj... 94/3. p.17-20.
205. Aktivecoj el landoj kaj sekcioj 92/4. p.34. p.38-40.
206. Aliĝilo por tri instruistaj kursoj en 1993 92/4. p.19.
207. Aliĝpeto el Kubo (laŭ leteroj de Hektor Jimenez) 92/3. p.31-32.
208. Alvokoj kaj mallongaj informoj 94/3. p.33.
209. Alvokoj por novaj kunlaborantoj, labortablete 93/1. p.36.
210. Centoj da faroj kaj decidoj. La Estrarkunsido en Budapeŝto 92/1. p.33-35.
211. Deka Internacia Metodika Seminario (aliĝilo) 92/4. Suplemente.
212. Eduka rezolucio akceptita de la Komitato de UEA en Vieno 92/3. p.15.
213. Eksteraj rilatoj (kaj Fondajo Szerdahelyi) 92/2. p.21.
214. Ekzamenoj UEA/ILEI: protokolo 1992 93/1. p.16-17.
215-219. El la landoj... 92/1. p.25.; 95/1. p.22-26.; 95/2. p.21-27.; 95/3. p.20-28.; 95/4. p.17-20.
220. Enketilo pri instruado kaj mendilo por Tendaraj tagoj 91/3. Suplemente.
221. Eŭropemaj instruistoj havas kuntekston (magazino Context) 92/4. p.26-27.
222. Financa raporto 1993 94/1-2. p.50-52.
223. *Gvidilo anglalingva por Tendaraj tagoj (1). Verkis M. Jones*. 94/4. p.15.
224. ILEI-labortable (mallongaj informoj pri nia kuranta laboro). 92/2. p.19-20.
225. Infanoj ĉirkaŭ la mondo 92/1. p.12.

226. Informoj pri la kresko de Juna amiko en 1993. 92/3. p.33.
227. Instrui komunike, intensiva praktika kurso 92/2. Suplemente.
228. Internacia Komisiono pri Edukado por la 21-a Jarcento 94/1-2. p.45.
229. Internacia Tago de Infanaj Rajtoj 95/1. p.33.
230. Kalendaro, labortablete 93/1. p.28.
231. Komitato de ILEI. Diskut-punktoj por Paterna 93/2. p.31.
232. Konatiĝu kun la nova redaktoro, Németh József 94/4. p.35-36.
233. Konciza gvido al ĝangalo de instancoj 92/4. p.27.
234. Konferencoj nacilingvaj pri lingvo-instruado / KCE ofertas 92/2. p.18.
235. Konstatoj pri la nuna E-instruado; Raporto el Fortaleza... 92/1. p.19-20.
236. Kontribui alt-nivele al IPR 94/3. p.34-35.
237. Korespondu kun usonaj junuloj 94/4. p.28.
238. La Manifesto de Raŭmo 91/1. p.25.
239. Laste aperis 92/2. p.35-36.
240. Leterkesto (Pirlot, Lineckij, Grosjean) 91/4. p.32-33.
241. Mallonge ni mencias 94/4. p.29-30.
242-243. Mendilo de la Libroservo de ILEI 94/3. p.20.; 94/4. p.21-22.
244. Mendilo por *Tendaraj tagoj* kaj aliaj libroservaj varoj 93/4. p.19-20.
245. *Ni esploru la mondon* (recenzo) 91/2. p.29.
246. Ni prezentas novajn estraranojn de ILEI: B. Casini, A.O. Rojas 95/3. p.6.
247. Niaj sekcioj kaj membroj aktivas (smg) 91/1. p.33-36.
248. Noticoj el la granda mondo 91/2. p.35.
249-250. Pedagogia Kalendaro 92/4. p.29.; 94/3. p.16.
251-253. Por via notlibro 95/1. p.33-36.; 95/3. p.28-36.; 95/4. p.34-36.
254. Projekto Fundapax 94/1-2. p.43-44.
255. Proklamo de Voss - proklamo, kiu sintezas (konf. rezulto) 91/3. p.4-5.
256. Protokolo sinteza de la Komitato de ILEI en Bratislavo 92/3. p.14.
257-259. Recenzoj 91/4. p.25-31., 93/3. p.35-36.; 94/1-2. p.31-37.
260. Regularo de internacia konkurso por lernejoj 92/2. p.24-26.
261. Rezolucio akceptita de Ia 25-a Konferenco de ILEI 91/3. p.2.
262. Rezolucio pri edukado akceptita de la Kom. de UEA en Bergeno 91/3. p.7.
263. Rezolucio pri la Jaro de la Familio, proklamita de UN por 1994.. 91/3. p.8.
264. Rezulto de la enketo pri lernejo instruado 1991-92. 92/1. p.36-38.
265. Sinprezento de akrobata rolulo el la ... *Tendaraj tagoj*. 93/4. p.21-22.
266. Statuto de ILEI (propono por la 25-a ILEI-Konferenco) 91/1. Suplemente.
267. Stipendio Ivo Lapenna / Enketilo 92 pri universitata instruado 91/4. p.15.
268. Studplanoj de la universitato ELTE (1990/91) 91/2. p.7-10.
269. *Tendaraj tagoj (3)* (recenzis: Angela Teller kaj aliaj) 94/4. p.13-14.
270. Trijara laborplano de ILEI (1992-94) 92/1. Suplemente.
271. Trijara laborplano de ILEI (1995-97), Rezolucioj de la Konferenco en Övik 95/3. p.3-5.

Tem-indekso 1991-1995

Laŭtema indekso por jarkolektoj 1991-95 de Internacia Pedagogia Revuo.
(La ciferoj referencas al la laŭaŭtora indekso.)

Aranĝo
–Fakkunveno de instruistoj, kursoj, pedagogia kalendaro 22, 28, 75, 83, 101, 112, 113, 157, 230, 234, 249, 250
–IMS 12, 17, 211 –UK 33
ILEI
–Ekzameno 23, 25, 51, 60, 66, 72, 77, 214,224
ILEI
–Financo, fondajo 2, 3, 4, 5, 6, 25, 162, 163, 222
–Labordokumento 1, 18, 32, 52, 58, 59, 61, 62, 74, 87, 142, 192, 210, 231, 246, 270, 271
–Sekcioj 19, 20, 25, 77, 78, 81, 124, 160, 187, 195, 205, 207, 208, 209, 215, 216, 217, 218, 219, 220, 224, 247, 248
–Statuto 266
ILEI Konferenco 15, 200, 201, 202, 203, 204
–Fakprelego 9, 50, 62, 91, 151, 152, 199

–Festparolado, mesaĝo 34, 35
–Gimnazio 10, 13, 14, 15
–Raporto 38, 82, 92
–Rezolucio, rezulto 91, 255, 256, 261
Interlingvistiko 8, 37, 49, 55, 56, 64, 88, 90, 94, 95, 96, 116, 118, 139, 147, 167, 168, 169, 173, 178, 179, 183, 185, 196, 238
IPR 70, 135, 232, 236, 240
–Indekso 122, 125
–Redakcia mesaĝo 65, 121, 123, 155, 159
Konkurso 129, 131, 132, 134, 137, 140, 142, 260
Lernejpolitiko, lingvopolitiko 11, 71, 145, 146, 149, 150, 180, 196, 228, 264
–en elementa lernejo 29, 45
–en universitato 46, 120, 186, 197, 267, 268
–en Ameriko 127, 165, 205, 235, 237
–en Azio 68, 127, 160, 205
–en Ĉinio 127
–en Finnlando 172
–en Germanio 45, 99, 158
–en Hungario 120, 127, 131, 132, 156, 186, 197
–en Italio 29
–en Norvegio 174
–en Rusio 145
–en Svedio 46
–UEA 212, 262
Lingvistiko 11, 27, 98, 100, 193, 194
Metodiko, instrupraktiko 24, 47, 84, 140, 166, 174, 175, 235
–Eksperimento 26, 29, 108, 143, 254
–Ekzerco 54, 128, 130, 138, 161
–Gramatiko 136, 181
–Lernolibro, instruhelpilo 40, 57, 102, 105, 106, 107, 110, 119, 154, 164, 176, 184, 265
–Metodo, maniero 7, 16, 103, 126, 133, 144, 148, 182, 188-190, 198, 199
–Motivado 104, 141, 153
–Propedeŭtiko 31, 86, 183
–Trejnado de inst-istoj 30, 36, 53, 63, 206, 227
Organizaĵo 93, 233
Recenzo 85, 239, 257, 258, 259
–Beletraĵo 76, 79, 97, 111, 114, 115, 117, 177
–Instruhelpilo 67, 191, 245
–Lernolibro 69, 73, 89, 109, 170, 223, 269
–Metodika verko 39, 43
–Scienca verko 80, 86, 171
Statistiko 1, 150, 264

La indeksojn kompilis ***Németh József****, redaktoro*

Katalin Smidéliusz ***Intervjuo kun Dennis Keefe***

BEKunu, BEKdu, BEKtri, BEKkvar...

(Daŭrigo de la intervjuo)

Sekvante vian kurson, kiom da tempo estas bezonata por forlasi la titolon "komencanto"?

Mi pensas, ke se la lernanto estas plenkreskulo sed ne tro maljuna, se la lernanto jam studis sukcese unu aŭ du fremdlingvojn, se la lernanto ĉeestas ĉiujn lecionojn, kaj estas denaska parolanto de eŭropdevena lingvo, bezonata estas minimume 100 horoj. Alikaze, pli. La tuta kurso povus daŭri plurcentojn da horoj por ekzemple japano kiu estas maljuna kaj kiu neniam lernis fremdlingvon en lernejo. Dirinte tion, mi pensas, ke estas tro da esperantistoj kiuj pensas, ke tradicia unuagrada kurso sekvata de tradicia duagrada kurso sufiĉas. Tia tro simpla pensado estas, laŭ mi, granda malhelpaĵo por la disvast-

(Daŭrigo sur la 21-a paĝo)

JUBILEA 30-a ILEI-KONFERENCO

kaj 4-a GIMNAZIO DE ILEI

Tábor, Ĉeĥio,

27-a julio – 2-a aŭgusto 1996

Aliĝadreso: *Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294, Hörby, Svedio.*

Konferenca temo: Rimedoj por bona lernado kaj memlernado de Esperanto.

Loko: TÁBOR - historia urbeto kun ĉ. 40 mil loĝantoj, situanta 90 km sude de Prago, sur la ĉefa konektolinio kun Linz (Aŭstrio), sendube apartenas al la plej vizitindaj kaj vizitataj lokoj de Ĉeĥio. Fondita en 1420, ĝi ludis ŝlosilan rolon en la pinta evento de la ĉeĥa religia historio - nome en la husana movado, eneŭrope la unua amasa provo pri religia reformo, grave influinta cent jarojn pli poste la reformacion de Luther, Kalvin kaj Zwingli. Konserviĝis multaj mezepokaj memorindaĵoj allogantaj turistojn: urbodomo kun husana muzeo kaj subtera koridoraro, preĝejo, burgo, urbanaj domoj; krome ĉarmetosa baroka pilgrimloko Klokoty, akvorezervujo sur la rivereto Jordan, kaj aliaj interesaĵoj. Ĉion ĉi povos viziti la partoprenantoj kadre de la ripoza programo.

Konferencejo: La konferencejo estas moderna novkonstruita Sudbohemia universitato situanta en la urbocentro. Je la dispono estos kongresa salono por 140 personoj kaj 4 aliaj klasĉambroj kun kapacitoj por 30-70 personoj. La konferencejo disponas pri ĉiuj utilaj helpiloj kiel videoaparatoj, projekciiloj, kopiiloj, mikrofono, ktp. En la teretaĝo troviĝas dancsalono por vesperaj programoj. En la subteretaĝo estas memserva vendejo uzebla dum paŭzoj.

Loĝigo: Por ebligi partoprenon al plejeble multaj, organizantoj decidis pri du variantoj, kiuj donas eblon elekti inter komforto kaj malaltaj kostoj. Ambaŭ loĝlokoj estas tuj apud la universitato.

1) La baza kategorio por loĝi kaj manĝi estas mezlerneja internulejo kun trilitaj ĉambroj, simpla meblaro kaj necesejoj/duŝejoj surkoridore. La loĝado estas neniel luksa, sed plenumas ĉiujn bazajn kondiĉojn. Ĝi liveras ankaŭ malgrandajn kuirejojn kaj komunajn ĉambrojn por kelkdek personoj. Kontraŭ krompago eblas aranĝi dulitajn ĉambrojn, kies nombro estas tamen limigita.

2) La alia alternativo estas ***-stela hotelo PALCAT, kiu disponas pri unu- kaj dulitaj ĉambroj kun propra duŝejo/necesejo. Kontraŭ krompago eblas aranĝi ankaŭ ĉiujn manĝojn en la hotelo.

Ni sukcesis mendi entute 130 lokojn (90 + 40). Tial estas rekomendinde ne tro prokrasti la aliĝon!

Ekzamenoj: Kiel kutime, ankaŭ dum ĉi tiu konferenco estos organizita ekzamensesio de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI je elementa kaj meza niveloj. Por pliaj detaloj turnu vin al la Sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono: *Prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb,*

Kroatio. Krom la informoj ĉiuj ricevos malnovajn testojn. Nepre menciu la nivelon, kiu interesas vin. La ekzameno kostas 60 %-ojn de la MA-UEA kotizo por via loĝlando. Fruaj aliĝontoj ĝuos rabaton!

Kotizoj:

(Landa disdivido kongruas kun UEA-divido. La kotizoj estas fiksitaj en nederlandaj guldenoj kaj svedaj kronoj.)

Devenlando	B	A
- internuleja kategorio	180 NLG aŭ 790 SEK	240 NLG aŭ 1060 SEK
- hotela kategorio	390 NLG aŭ 1720 SEK	

Specialaj krompagoj :

- unulita ĉambro en la hotelo 120 NLG aŭ 500 SEK
- ĉiuj manĝoj en la hotelo 120 NLG aŭ 500 SEK
- dulita ĉambro en la internulejo 35 NLG aŭ 150 SEK
- bustransporto (27.7.) Praha - Tábor 10 NLG aŭ 50 SEK
- bustransporto (2. 8.) Tábor - Praha 10 NLG aŭ 50 SEK (pagenda surloke se aliĝos almenaŭ 25 personoj). Ĉiu mem prizorgas sian asekuron.

La kotizo inkluzivas:

- 6 tranoktojn en 3-lita ĉambro (en hotelo - dulita)
- 3 manĝojn tage (ekde vespermanĝo 27.7. ĝis matenmanĝo 2.8.)
- kompletan konferencan programon en la universitato
- duontagan ekskurson tra la urbo kun enirpagoj
- duontagan busekskurson al la ĉirkaŭaĵo kun enirpagoj (supozeble al la kastelo Hluboka)
- muzikan (danc)vesperon (trinkaĵoj krompageblaj)

Rimarkoj:

- La aliĝo fariĝas valida nur post kompleta pago. Esceptojn por partoprenontoj el landoj kun transpagaj problemoj eblas trakti kun Bertil Andreasson (vidu la aliĝadreson).
- Aliĝoj post 31.3.96 estas ŝarĝataj per pluaj 10 %.
- Aliĝoj post 30.6.96 estas sen ajna garantio kaj ŝarĝataj per 30 %.
- Se ĝis 30.4.96 la oficiala banka kurzo inter ĉeĥa krono kaj NLG kompare kun decembra ŝanĝiĝos je pli ol 5 % malfavore al NLG (ĉeĥa krono fariĝos pli potenca ol nun), la organizantoj pretendas adekvate altigi kotizojn, sed maksimume je 10 %. Subskribo de la aliĝilo signifas konsenton pri tio kaj pretecon krompagi surloke.

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:

a) al nia UEA-konto: ilek-a, indikante ILEI-konf. (Pĝk de UEA: 37 89 64)
b) al poŝtĝirkonto n-ro 68 21 17 - 7, ILEI, Södra Rörum pl 455, S-242 94 HÖRBY, Svedio
c) per via banko al la sama adreso. Bv. aldoni 10 NLG (50 SEK) por bankkostoj

Pagante per Eŭroĉeko kaj al UEA per kredit-kartoj oni ne suferas deprenojn.

INVITO AL LA KVARA ILEI-GIMNAZIO

Tábor, 27-a julio – 2-a aŭgusto 1996.

Karaj Gejunuloj 13-16-jaraj, estintaj kaj estontaj Gimnazianoj!

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas vin partopreni la kvaran Internacian Someran Gimnazian Semajnon (ILEI-Gimnazion).

En la Gimnazia Semajno vi povas

- interamikiĝi kun geknaboj el plej diversaj landoj de la mondo;
- ĝui kelkajn interesajn studhorojn (nur 30-minutajn!) pri E-lingvo, E-literaturo, matematiko, geografio, fiziko, muziko, sporto k.s., lernante kuriozaĵojn;
- ekskursi, viziti vidindaĵojn de la regiono;
- ludi ne konkursajn, sed kunagadajn ludojn; amuziĝi;
- prezenti scenojn, muzikon, dancojn, poemojn k.s. al la tuta konferenco kaj
- proponi, iniciati eĉ gvidi kelkajn programerojn.

La Gimnazio ebligas partoprenon por maksimume 20 geknaboj.

Vi estas bonvena en la ILEI-Gimnazio, se

- vi havas aĝon de 13-16 jaroj
- vi bone parolas la lingvon Esperanto (kie ajn vi lernis aŭ lernas ĝin)
- vi volonte submetiĝas al la disciplino de la Gimnazio
- viaj gepatroj (aŭ societo, fondaĵo k.s.) entreprenas pagi la partopren-kotizon kaj la vojaĝon.

Tute ne gravas, kiuspecan lernejon vi vizitas en via lando, nek tio, kiujn juĝnotojn vi havas en la lernejo.
Gravas, ke vi fartu bone en internacia societo de samaĝuloj, krome ke vi volu fariĝi pli kaj pli klera kaj sperta, lernante en amuza formo en la Internacia Lingvo.

La kotizo: ebligas por la ILEI-Gimnazianoj 20 %-an rabaton, do la sumon vidu en diversaj valutoj sur la Aliĝilo.

La ***Aliĝilon*** bonvolu resendi ĝis la 15-a de majo 1996 al s-ro Andreasson la kasisto de ILEI, sed vian partopren-intencon bonvolu anonci ĉe mi laŭeble jam pli frue.

Barcsay Zsuzsa,
Bem rakpart 25/B, H-1011 BUDAPEST, Hungario

Aliĝilo:

30-a JUBILEA ILEI-KONFERENCO

kaj 4-a GIMNAZIO DE ILEI

Tábor - Ĉeĥio

27-a julio – 2-a aŭgusto 1996

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-292 94 Hörby, Svedio. Bonvolu plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu persono.

Mi aliĝas al la: Konferenco:_____; *Gimnazio:*_____

Familia nomo:..... Antaŭnomo:.....

Profesio:..... Sekso:..... Naskiĝdato:.....

Kompleta poŝta adreso:.....

.....

___Mi mendas ĉambron en la internulejo. *trilitan / dulitan*
___Mi mendas ĉambron en la hotelo PALCAT. *dulitan / unulitan*
___Mi krommendas manĝojn en la hotelo.
___Mi krommendas bustransporton Praha-Tábor.
___Mi krommendas bustransporton Tábor-Praha *(pagendan surloke).*
___Mi deziras manĝi vegetare.
___Mi havas alian dietan aŭ loĝigan bezonon, nome:.....
.....
___Mi volonte kontribuos al la programo per:.....
.....
___Mi interesiĝus pri sesio de la UEA/ILEI ekzamenoj: *elementa / meza.*

Pagon de ..... mi faris al ..... en valuto.....
___Mi partoprenos la Universalan Kongreson en Prago. *Jes/ne.*

Por gimnaziaj kandidatoj:
Mi aparte interesiĝas pri:.....
.....
Mi proponas por la gimnazio programeron:.....
.....
Mi volonte adaptiĝas al la normala disciplino de la Gimnazio.

Subskribo:..... Dato:..... Loko:.....

(daŭrigo de la 17-a paĝo)

iĝo de E-o. Se Esperantujo ne kapablas oferti aŭ doni kompletan sistemon - ne nur kursetojn kaj ŝtagojn - por preterpasi la stadion de komencanto, en Esperantujo, en la E-movado, en la E-lingvokomunumo restas nur tiaj personoj, kiaj estas ĝisostuloj, aŭ kiaj estas tre fervoraj, aŭ kiaj bezonas internacian familion. Tio estas granda risko por E-o, ĉar tiaj personoj estas granda malplimulto el la loĝantaro. Ni devas pensi pri la plimulto, tiuj kiuj ne estas samideanoj, ĉar ili fakte konsistigas 99% el la tutmonda loĝantaro.

Kiom da staĝoj vi havis instruante laŭ via metodo?

Ne sufiĉe. Eble ses aŭ sep. Kaj por fari la tutan, tio estas de **BEKunu** ĝis **BEKkvar** nur trifoje. La unua kompleta kurso okazis en Madrido, en 1988. Estis oktaga kurso kaj estis ok horoj en ĉiu tago. Entute mi havis dekunu personojn kaj ok el ili, se mi bone memoras, finis. Ĉe la fino de tiuj ok tagoj ili kapablis partopreni, kun iom da hezitoj kaj eraroj tamen, la Konversacian Rondon de la Liceo de Esperanto de Madrido. (Tiutempe multaj eminentaj esperantistoj multfoje ĉeestis tiun eventon, inter ili *Ĝian Karlo Fighiera, Ada Fighiera Sikorska, Georgo Kamaĉo, Miguel Fernandez, Juan Carlos Ruiz* ktp.) La dua kompleta kurso okazis en la Kastelo de Grésillon en somero 1988. Laŭ la komentoj de la kursorganizanto de la Kastelo, estis la unua fojo en Grésillon, kiam la gelernantoj (veraj komencantoj sen antaŭaj studoj de Esperanto) vere kapablis paroli ĉe la fino de la kurso. Interkrampe, la kvin personoj, kiuj faris tiun kurson revenis en la sekvanta jaro. Tri el ili iris rekte al la duagrada kurso, kaj du el ili eĉ partoprenis la triagradan kurson. Finfine, la tria kompleta kurso okazis en la urbo Tours en Francio lastjare. Estis ok personoj entute, sed nur du el ili estis veraj komencantoj. Unu el ili, dekkvinjara junulino parolis nur esperante dum pli ol unu horo la lastan tagon pri la libro *La verda koro* de Baghy. (Interkrampe, fundamenta parto de **BEKtri** kaj **BEKkvar** estas la legado de libroj ekster la leciono por prikomenti ilin dum la leciono).

Ĉu vi ŝatus, se via metodo disvastiĝus?

Jes kaj ne. Sciu, ke mi verkas la **BEK**kursaron ne por esperantistoj (mi ne deziras konvinki personojn, kiuj jam estas konvinkitaj), sed por neesperantistoj. Mi deziras, ke la kursaro estu uzata ekster la movado. Mi scias, ke mi revas, eĉ revegas, sed mi pensas, se la **BEK**kurso estos pli kaj pli bona kaj efika kaj profesia, iam ie iu diros al mi "Venu al firmao Sony en Tokio, instruu 5000 laboristojn aŭ estrojn por ni, kaj ni aĉetos domon sur sudpacifika insulo por vi kaj via familio. Krome, ni donos al vi televidilon kaj satelitan antenon por ke vi povu rigardi fremdlingvajn programojn la tutan tagon kaj ni mem sendigos al vi la lastajn esperantajn programojn el Varsovio!"

En la libroservoj mi nenie vidis viajn kursojn. Se iu deziras provi vian metodon, ĉu oni povas simple mendi la kajerojn kaj tuj ekagi aŭ oni devas unue observi kiel uzi la librojn?

Bonvolu ne skribi al mi petante aŭ mendante la librojn! Antaŭ nelonge Flandra Esperanto-Ligo skribis al mi demandante ĉu eblos eldoni la librojn. Eble ili faros tion. Ankaŭ estas eldonejo en Moskvo, kiu ekinteresiĝas pri la publikigado. Do eble la libroj estos en la merkato. Sed ni rememoru, ke la BEK-kursaro ne estas tradicia. Ĝi uzas la relative novan Valencian Metodon. Ĝi ne estas nacilingva, do tiaj klarigoj ne ekzistas. Ĝi baziĝas sur gruplaboro, kaj la plejparto el niaj instruantoj (mi ne diras instruistoj) neniam uzis tiun rimedon aŭ ne sufiĉe ofte utiligis ĝin. En la **BEK**kurso la instruisto neniam lernigas la prefiksojn nek la sufiksojn. La *-ig kaj -iĝ-sistemo* kune kun la *participa sistemo* ampleksas duonon el la kursaro. Pro tiuj malhelpaĵoj, kvankam la **BEK**kurso estas sufiĉe simpla, eĉ tre simpla por neprofesia instruisto, la instruontoj, mi supozas, bezonas vidi ĝin kaj sperti ĝin. Aĉeti la librojn en libroservo ne garantios, ke la kurso sukcesos. Mi pensas, ke oni devas ĉeesti staĝon, en kiu la metodo estas prezentata. Alia ebleco estus fari 30- aŭ 60-minutan vidbendon, en kiu vidiĝas la Valencia Metodo. Tio ne solvos la problemon, sed ĝi povas helpi multe.

Kio mankas al BEK?

Multego mankas. Mi jam menciis, ke la duono de la libroj ne estas finverkitaj. Mi devas refari la **BEK**-ekzamenojn, ekzamenetojn, kaj la grandan, finan ekzamenegon. Estos kasedoj por ĉiuj niveloj, sed feliĉe jam estas bonegaj kasedoj sur la merkato, ekzemple via sonkasedo *"Ĉu vi aŭdis, ke..."* kaj mi esperas baldaŭ aperos kasedo de la teamo *Laŭte* de SAT-Amikaro. Tiuj kasedoj povas esti uzataj post la fino de **BEKdu**. Ankaŭ devas ekzisti pli abunda legmaterialo por **BEKtri** kaj **BEKkvar**. Nuntempe estas devige tralegi "*Gerda malaperis, La verda koro*, kaj *Joĉjo*" sed mi ege deziras multe plilongigi tiun liston. Mi mem ne havas talenton por aŭtori tiajn librojn, do mi petas al vi esperantistoj helpi min. **BEK** estas sur komputilo, sed mankas bona komputila versio kiu uzos lerte la kapablojn de la komputilo, kaj por fari tion oni bezonus eble jarojn! Mankas kohera sistemo por fari multe pli da ekzercoj pri vortoj. BEK nun havas pli da ekzercoj ol iu ajn kurso kiun mi konas, sed **BEK** ankoraŭ restas neprofundeca rilate la vortstokon. Fakte, por plibonigi **BEK** estas bezonate enkomputiligi PIV-on kaj la ĉefajn modernajn gazetojn de Esperanto kiaj *Eventoj, Heroldo de Esperanto, El Popola Ĉinio, Esperanto, SAT-Amikaro, Monato* ktp. Tiuj kaj aliaj revuoj devas esti unuj el la plej grandaj fontoj de vortoj por lingvokurso. **BEK** nepre devas aktualigi kaj nuntempigi la vortojn uzatajn en la ekzercoj. Oni lernas lingvon por komuniki, kaj se la plejparto de la vortoj pritraktas la ŝafiston kun siaj ŝafoj sur la kamparo aŭ mian riĉan tajloron, niaj gelernantoj ĉiam hezitos kaj lamos kiam ili devos paroli pri la moderna socio. Mi pensas, ke estas eraro limigi la instruadon de lingvoj al la mil aŭ du mil pli oftaj radikoj uzataj. Lernanto bezonas multe pli ol tiom, aŭ tiu lernanto povas resti eterna komencanto. Mankas loko por instrui la **BEK**-kurson. **BEK** estas kvarnivela kursaro. Ĝi ne estas amuza ludilo por unu-

semajna aŭ dusemajna turisto. **BEK** strebas esti tiel serioza kiel la kursaroj de la *Goethe-Institut* aŭ la *Intensive English Institute* aŭ la *Monterey Language School* aŭ la *East West Center*. Lernanto komencas **BEK**on, tiu lernanto finas **BEK**on, tiu lernanto memstariĝas kaj sendependiĝas de la kursgvidanto kaj poste kapablas memlerni. Por tion fari **BEK** bezonas tempon kaj spacon, ne staĝeton. Mankas la kursoj post **BEK**. Tio eble estas la plej grava manko el ĉiuj. Estas kuraĝigaj komencoj en *La Chaux-de-Fonds*, en la *Kvinpetalo*, sed tiuj lokoj estas tro for por multaj personoj. Ni bezonas multe pli. Kongresoj speciale estas ekster la atingo de averaĝa lernanto. Mankas akvitaĵoj en la lokoj grupoj post **BEK**. Eĉ se **BEK** povas doni pli da parolantoj de Esperanto ol antaŭe (kaj mi ankoraŭ ne estas certa, ke ĝi enradikiĝos aŭ sukcesos pli vastskale) tiuj gelernantoj forlasos la Esperantan lingvokomunumon, se ne estas allogaj eventoj regule kaj proksime al ili. Lingvaj kursoj ne sufiĉas. Tiuj lernantoj bezonas nun uzi Esperanton por fari ion. Se estos aliaj kursoj de Esperanto, tiuj kursoj estu ne pri la gramatiko de Esperanto, sed tamen en Esperanto kaj pri io alia! Lasu al la novaj gelernantoj lerni ion ajn alian. Kursoj pri historio, pri arto, pri eksterlandaj kulturoj, pri vojaĝoj, pri io en si mem interesa kaj alloga. Daŭrigi la lernadon de Esperanto per aliaj kursoj pri kunmetitaj verboj aŭ aliaj pezaĵoj nur altiros la malplimulton. Sed, alifoje, mi deziras ripeti, ke la **BEK**kurso ne celas tiujn, kiuj jam estas konvinkitaj, ĝi serĉas tiujn kiuj ne estas tiaj. Granda bremsilo de E-o hodiaŭ, mi konjektas, estas la ideo ke nur la esperantistoj pravas, kaj ĉiuj aliaj ekster la movado havas eraran pensmanieron. Ni donu al ili la kursojn, kaj ni lasu al ili la rajton decidi tion kion ili deziras fari pere de E-o. Esperanto estas tre bela ideo, sed mi pensas, ke ni devas lasi pli da libereco al la novaj gelernantoj por fari ĉion kion ili deziras per Esperanto.

Postmeditado de la intervjuinto:

Mi - kiel fervora edukisto de E-instruistoj - kiu ĉiam kontraŭis la ideon ke netrejnitaj esperantistoj instruu la internacian lingvon, per la supra intervjuo tamen konigas metodon kies ĉefaj uzantoj estos verŝajne neprofesiuloj. Antaŭ ol vi demandas min pri mia ago, permesu al mi klarigi mian decidon: Mi daŭre kontraŭas, ke diletantoj rolu kiel instruistoj, sed la BEKkurso ne estas vera instrumetodo. Ĝi estas lernometodo. Ĝi estas ne malhavebla apogo ĝuste por tiuj, kiuj certe instruus ankaŭ sen tiu helpo, farante multe pli da eraroj restante sen programita materialo, sekvante proprajn instinktojn, neglektante pedagogiajn principojn. Nia instruista tasko estas ekkoni ankaŭ tiun ĉi metodon, helpi al kurs- kaj grupgvidantoj uzi ĝin dum nia foresto (aŭ je nia manko) por ke la komencantoj sub la tele-gvidado de profesie preparita materialo saĝe praktiku Esperanton. Mi trovis la materialon tre interesa kaj valora, kaj konsilas al ILEI-estraro inviti sinjoron Keefe al iu ILEI - konferenco aŭ aranĝo por

prezenti sian kurson al ni, ja mi estas konvinkita pri tio, ke ankaŭ tre spertaj kolegoj trovos multon por "ŝteli" el la BEKkurso kaj tiel kolorigi, riĉigi la tradiciajn kursojn kaj studhorojn. La kontaktadreso de ***Dennis Keefe***:

6 rue Toulouse LAUTREC, F-37000 TOURS, Francio, Tel.: (33)-47-20-16-74. Fax: (33)-47-64-47-84 email: dekeefe@Dialup.FranceNet.fr

El la landoj kaj sekcioj

Argentino

ILEI havas novan sekciestron en Argentino. La nova estro estas *Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal.*

En urbo Bariloche okazos ekzamensesio de la 4-a ĝis la 7-a de aprilo 1996.

Atilio Orellana Rojas

Brazilo

De la 10-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1995 okazis en la Universitato Estácio de Sá en urbo Rio de Janeiro Enkonduka Kurso al Esperanto gvidita de s-ino Telma Oliveira Ribeiro. La kurson ĉeestis entute 12 gelernantoj dum 24-hora kurso. La Universitato intencas okazigi plian fojon tian kurson, sed por instigi la rektoron favori plian kurson tie, la instruistino sugestis leteri al la rektoro, ĉu en la portugala, ĉu en Esperanto.

Jen la adreso: *Universidade Estácio de Sá, Pró-Reitoria de Extensão, Rua do Bispo 71 Rio Comprido, BR-20261-060 Rio de Janeiro RJ, 20261-060, Brazilo*

Atilio Orellana Rojas

KAMPANJO EN CAMPINAS - SP - BRAZILO

En la beletra fakultato de urbo JAÚ (ŝtato San Paulo) kune kun mia fratino, f-ino *Leda Gama* mi faris ekspozicion kaj prelegon pri E-o - la 3-an de majo 1995. Ĉeestis ĉ. 140 homoj, plejparte lernantinoj. La evento vekis la intereson eĉ de tri profesorinoj: *Jean M. Sudaia, Maria Valdete O. Cestari* kaj *Maria Cristina*. Ĉi-lasta ĉiujare taskas al siaj lernantinoj fari esploron pri artefaritaj lingvoj. Unu el ŝiaj lernantinoj, s-ino *Tania Pinheiro* dum tia esplorado ekkonis E-on, pli kaj pli interesiĝis pri la afero, sekve ŝi invitis nin el urbo CAMPINAS por prezenti la lingvon al la tuta Beletra Kurso. Dum miaj prelegoj mi klarigas ne nur la necesecon de E-o, sed ankaŭ ĝian ĝeneralan gramatikan strukturon. Aŭskultinte la prelegon prof-ino *Maria Valdete* deklaris: ekde nun ŝi instruos morfologion pere de E-o. En septembro oni sciigis min, ke pluraj gelernantoj de tiu fakultato organizas sin por grupe ekstudi la lingvon.

Veturante hejmen ni tranoktis ĉe la familio de s-ino *Tania Pinheiro* en urbo BROTAS. Ankaŭ tie ni interkonatiĝis kun interesemaj personoj, inter ili kun la urbestro mem. Rezulte de tiu renkontiĝo la 20-an de majo ankaŭ tie okazis ekspozicio kaj prelego, poste ekfunkciis kurso por 23 personoj.

En urbo CAMPINAS mem, usonano, s-ro *Pedro Maranto*, lernejestro de fama katolika lernejo Notre Dame apogis la ideon organizi tie E-ekspozicion, kiu efektiviĝis la 17-an de majo, helpe de esperantistinoj f-inoj *Arledne A. Davi* kaj *Leda Gama*. Samtempe - kune kun profesoroj *I. Baracho* kaj d-ro *J.P.O. Santos* - ni ekorganizis ekspozicion ankaŭ en la Matematika Instituto de Unicamp (Ŝtata Universitato en urbo Campinas). Ekde la 12-a de septembro mi instruas la lingvon al 42 homoj, en du grupoj, kadre de la Instituto. Prof. *José Plinio O. Santos* fervore apogas nian movadon, kaj kune kun sia filo diligente frekventas la kurson. Plie, li petis min esplori la universitatojn tutmonde, kie E-o estas oficiale instruata, li ja planas proponi oficialan enkondukon de nia lingvo ĉe Unicamp.

Juscelino Gama,
E-Grupo de Unicamp

Britio

Esperanto Teachers' Association (brita sekcio de ILEI, *140 Holland Park Avenue, London W11 4UF Tel: 071 727 7821*) dezirus scii pri landoj, kiuj havas - kiel ni - senpagan enkondukan korespondan kurson pri Esperanto. La demando leviĝas, ĉar ni konscias, ke estas multaj homoj en nia lando, kiuj ne parolas la anglan kiel denaskan lingvon: al tiuj ni dezirus povi disponigi kursojn en iliaj propraj lingvoj. Serĉataj estas precipe kursoj en la ĉina, hindia, panĝaba, pola, urdua, ukraina. Ni havas eĉ la ideon, ke eble ILEI povos arigi kaj teni ekzemplojn de tiaj kursoj (kun rilata kontaktadreso) por almenaŭ povi informi pri ties ekzisto.

Malcolm Jones
1 Regent Avenue, Skipton N.Yorks. BD23 1AZ Tel: 0756/799912

SENPAGA KURSO EN LA KIMRA

Aperis senpaga poŝta kurso en la kimra, la plej vaste parolata membro de la kelta lingvofamilio. La kurson pretigis Mari Roberts. Ĝis nun ekzistis nur la bona vortareto kimra-Esperanta de John Wells (1985), sed ne estis presita enkonduko al Esperanto per kimraj klarigoj. La kurson administros E-Federacio de Kimrio.

laŭ ***Hilary Chapman****, Britio*

Bulgario

Esperantista societo „Lumo" - Veliko Tarnovo, Bulgario, informas, ke la 14-a sesio de Internacia Somera Esperanto - Universitato okazos inter la 13-a kaj la 15-a de julio 1996. Dum la sesio okazos ekskurso al historiaj objektoj. Post la sesio okazos 5-taga ripozo ĉe Nigra Maro. Pliaj informoj ĉe:

Jordanka Nikolova Ivanova,
bul. Bulgario, 15, p.k.6, BG-5000 Veliko Tarnovo

Ĉeĥio

(el Eventoj n-ro 0091)

Jam de kelkaj jaroj daŭras la praktiko ke germana kaj ĉeĥa E-junularo havas komunan someran E-kurson en Prago. Kutime ekzistas 3 grupoj, en 2 oni

instruas nacilingve (germane kaj ĉeĥe), kaj estas ankaŭ E-lingva progresiga kurso. Dum la novembra MEJK (mez-eŭropa junulara konsultiĝo) oni ekplanis la plilarĝigon de la partoprenaj landoj. Depende de la landaj E-organizaĵoj (kiuj devas zorgi pri varbado kaj nacilingva instruisto) povos okazi samtempe pluraj grupoj, ĝuante la internacian junularan etoson. Interesiĝantoj pri la partopreno kontaktu sian landan junularan E-organizon. La preparon kunordigas ĈEJ kaj

***Marion Grosjean**, Rue du Nord 73, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svisio.*
Rete: 100776.130@compuserve.com

Hindio

ESPERIGA KURSO EN ORIENTO

La 10-an de majo aperis en ĉiuj gravaj ĵurnaloj de Bangaloro, ke *Bangalora Esperanto-Centro* organizas senpagan E-kurson. Ĝi okazos ekde la 20-a de majo ĝis la 1-a de junio 1995. La lecionoj daŭros ĉiuvespere naŭdek minutojn.

En Nacia Kolegio 75 personoj eklernis la lingvon internacian kun granda entuziasmo. La komenca tago estis unika, ĉar sinjoro *Roberto Sorto* el Argentino prelegis pri la movado, kaj kuraĝigis la lernantojn.

En la unua semajno d-ro **Ŝirdi Prasad Ŧekur** instruis gramatikon. Li jam havas grandan sperton en gvidado de kursoj al medicinaj studentoj. Poste **Ŝ. Ŝ. Pradhan** transprenis la katedron: kun lia helpo la kursanoj praktikis konversacion, tradukadon, legadon en E-o. Ĝis la lasta tempo Bangalora E-Centro ne disponis pri propra instruisto, sed s-ro **Pradhan** estas bone preparita: li havis la eblecon partopreni UK-79 en Seulo, ILEI-Konferencon, Cseh-kursojn, prelegvojaĝon en Koreio.

La kursanoj varbiĝis el ĉiuj tavoloj de la socio. Ĉeestis ekz. la mondfama eks-kriketisto **B. Ŝ. Ĉandraŝekar**. Kun granda intereso partoprenis s-ino Prabha Prabhu, instruistino de la germana lingvo, kiu ofte informis siajn gekolegojn pri la origino de la vortradikoj. S-ino **Ðeepa Ṁohan** antaŭ kelkaj jaroj lernis E-on per koresponda kurso de *Brita E-Asocio*; nun ŝi volas refreŝigi sian scion. Estis eĉ kompleta familio: ges-roj **Parameŝwara** kaj ilia filino **Pallavi**. S-ino **Ђemalatha Ram Kumar** en oktobro intencis veturi al Londono; ŝi esperis, ke E-o helpos ŝin tie. Tri kolegoj en la sama oficejo - **Ŗina. Ĉitra** kaj **Ĝajmon** - planas praktiki la lingvon en sia laborejo.

Venis krome gestudentoj de altlernejo, universitato, venis dommastrinoj, inĝenieroj, pensiuloj... Du fraŭlinoj, **Ŝavitha** kaj **Ŝandja** instruis kanti „*La Espero*"-n al la tuta klaso. Radio-amatoro, s-ro Ramaswamy prelegis duonhoron pri la rilato de E-o kaj radio-amatoroj, prezentante la funkciadon de amatora radio.

La lasta tago estis festo. En la koridoro de la Kolegio atendis la gastojn ekspozicio de E-aj libroj kaj afiŝoj. Alvenis niaj honoraj gastoj: d-**ro C. Ṁ. Francis**, la eksdirektoro de *Medicina Kolegio St. John en Bangaloro*, redaktoro de monata revuo „Catalyst". En tiu revuo li publikigis korespondan kurson pri E-o, certe la unuan fojon en la historio de nia lando.

La kunveno komenciĝis per komuna kantado - laŭdo al la Dio de Scio. D-ro Francis solene disdonis la atestilojn al la gelernantoj, poste li parolis pri la utileco de E-o. Li laŭdis la planon, ke la kursanoj ne por ĉiam adiaŭos unu la alian, sed intencas kunveni ĉiumonate por daŭre praktiki la lingvon. Fine li promesis „katalizi" funkciadon de E-kluboj - pere de sia revuo Catalyst.

S. S. Pradhan

Hungario

INTERNACIA DEKLAMKONKURSO HONORE AL JULIO BAGHY - 30.03.1996

La konkurso estas organizata en urbo Pápa jam la sepan fojon. Ĝi okazos en 4 kategorioj: *I. 6-10-jaruloj, II. 10-14-jaruloj III. 14-18-jaruloj IV. Plenkreskuloj.* Ĉiu konkursanto libere elektas por si mem prozaĵon aŭ poemon, kiun li aŭ ŝi poste prezentos parkere, antaŭ internacia ĵurio.

La konkurson kompletigos kulturaj programoj, tiel la gastoj povas alveni jam la 29-an de marto, kaj resti ĝis la 31-a de marto, posttagmeze.

Aliĝkotizo: 2 NLG. Programoj, du tranoktoj kaj manĝado en studenthejmo: 25 NLG. La interesiĝontoj povas ricevi pli detalajn informojn de la organizanta bazlernejo: *Nagy László Általános Iskola, Pápa, Anna tér 1. H-8500 Hungario, tel. 36-89-324-896*, aŭ de la redakcio de IPR. Limdato de la aliĝo: la 10-a de marto 1996.

József Németh

75 NUMEROJ DE JUNA AMIKO FESTITA

Kadre de la Budapeŝta Zamenhof-festo en la 16-a de decembro 1995, prezentiĝis memora arta programo por festi la kontinuan 23-jaran aperadon de la junulara revuo *Juna amiko* el la hungara ĉefurbo.

Ĝia provnumero aperis en novembro 1972 de s-ro Géza Kurucz, kiu ĝin prizorgis tra naŭ jaroj, sekvata dum kvin jaroj de s-ro Oldrich Kníchal kaj dum pliaj naŭ de Stefan MacGill - tri redaktoroj el tri naciecoj. Sed superas ilin je longa servado la ilustristo Pavel Rak el Prago, kies unua desegnaĵo aperis en la tria numero kaj plej freŝaj en la jubilea 75-a numero (1995/4).

La pli ol cent partoprenintoj aŭdis, ke la revuo eniras 85 landojn kun 1140 abonantoj kaj pli ol 300 pliaj ricevantoj. Mejloŝtonoj por la revuo estis ĝia oftiĝo de 3- ĝis 4-foja aperado jare en 1990 (baldaŭ post transdono de la eldonado de HEA al ILEI) kaj ĝia ampleksiĝo de 24 ĝis 32 paĝoj en 1993.

Post tiu enkonduko, Erika Tóth, Péter András Rados kaj la nuna redaktoro deklamis poemetojn kaj ŝercojn el la nula, deka, dudeka kaj ceteraj numeroj; kanton prezentis Gyöngyi Mézes (Perlo Miela). La vario, ĉarmo kaj koncizeco de la eroj renkontis aklamon, i.a. aŭdiĝis poemoj de Ludmila Jevsejeva (Latvio) *Enigmo*, Imre Szabó (Hungario) *Semajno*, Eli Urbanova (Ĉeĥio) *Cirka Ĉevaleto*, Bertram Potts (Nov-Zelando) La *Burdo* kaj Sándor Petőfi *La Inkbotelo* en traduko de Miklós Fehér (Hungario).

Indekso de ĉi tiu 23-jara trezoro de infana literaturo estas kompilota, kiel ankaŭ ekspoziciaj afiŝoj de kelkaj pli mallongaj eroj. Ne-abonanto de la revuo rajtas peti senpagan specimenon de

Juna amiko, p.f. 193, H-1368 Budapest, Hungario

PEDAGOGIAJ TAGOJ EN BUDAPEŜTO *denove!*

Tiu ĉi tradicia kunveno de pedagogoj okazos inter la 24-a kaj 25-a de februaro 1996. Vi povas ricevi detalajn informojn de s-ino ***Zsuzsa Barcsay***, *Bem rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario. Tel. +36-1/ 2012342.*

Islando

Ekde 1974 Esperanto estas elektebla kiel libera fako en la gimnazio de *Hamrahlid, Rejkjaviko*. Kvankam ne anoncis sin sufiĉe multaj lernantoj ĉiujare por okazigi kurson, tamen kelkaj dekoj da gejunuloj lernis la lingvon tra la jaroj. La Esperanto-kursojn ĉiam gvidis *Baldur Ragnarsson*, kiu instruas islandan lingvon kaj literaturon en tiu gimnazio,.

Ĉi-jare okazis en la gimnazio trimonata E-kurso kun ses lecionoj semajne. Ĝi estis eksterordinara en tiu senco, ke ĝin partoprenis gejunuloj el ses landoj: Islando, Germanio, Nederlando, Francio, Finnlando kaj Italio. Instruisto estis *Baldur Ragnarsson*. La neislandanoj estis gastlernantoj kaj studis ankaŭ aliajn fakojn, precipe la islandan lingvon. Multa entuziasmo regis inter tiuj gejunuloj pri la internacia lingvo kaj ili ĉiuj finis brile siajn studojn.

Hallgrímur Sæmundsson

Jugoslavio

ESPERANTA AKADEMIO LANĈITA EN JUGOSLAVIO

La instruadon de Esperanto en la nuna Jugoslavio (Serbio + Montenegro) fake prizorgas la Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kun sia Pedagogia Sekcio, kunlabore kun lokaj esperantistaj organizaĵoj. Ĝi reguligas la instruprogramojn kaj eldonas la diplomojn por la ŝtupoj A (komenca), B (daŭriga) kaj C (supera). Fakte A-ekzamenoj okazas, B nur kelkaj kaj C jam delonge tute ne. Dum la lastaj jaroj nur kelkaj jugoslavoj pasis internaciajn UEA/ILEI-ekzamenojn, sed ekster la zorgo de la Instituto. La instruadon organizas E-societoj en publikaj kursoj kaj enkadre de lernejaj kromaktivecoj. Menciindas ankaŭ la kursoj por fervojistoj kaj por studentoj en Belgrado.

Semajnofine, la 14-an kaj 15-an de okt. 1995 okazis esperantista renkontiĝo en la sudorienta parto de Serbio, sude de la urbo Vranje, en la monaĥejo Sankta Prohor Pĉinjski. La programo enhavis ankaŭ dusesian rondan tablon pri *Perspektivoj de plua esperantista agado en Jugoslavio* kun aparta atento dediĉita al instruado de Esperanto, al manieroj kiel interesi diplomitojn resti en la movado, al la rolo de UEA kaj al *Trijara laborplano de ILEI*. La diskuton ĉeestis preskaŭ ĉiuj 60 partoprenantoj de la renkontiĝo. Aparte varme estis aprobata la decido fondi E-Akademion ESPROHOROVO, kiun organize kaj teknike prizorgos la Fervojista Esperanto-Societo de Vranje kaj fake gvidos la Esperanto-Instituto de SEL, Belgrado. Kun iom pretenda titolo, la Akademio funkcios kiel medio por realigado de la programo de la Esperanto Instituto sur la kampoj instruada, eldona, esperantaplika kaj primovada. Ĝian sukceson garantias agemo de esperantistoj en Vranje, inklino de la tieaj aŭtoritatoj, firmaoj kaj negocistoj kaj bonegaj naturaj kaj gastigaj kondiĉoj. La unuaj aranĝoj estas planataj por la somero 1996. Pli konkretaj informoj aperos ĝustatempe en Esperantaj informiloj, same pri aliaj aranĝoj planataj en aliaj lokoj kontinente kaj marborde.

***Radojica Petrovič**, Bul. oslobodjenja 36. YU-32000 Čačak, Jugoslavio*

Kostariko

Inter la 12-a kaj 17-a de februaro 1996 okazos la 3-a Amerika Esperanto-Kongreso en Kostariko. Dum la Kongreso oni aranĝos ankaŭ ekzamensesion. Aliĝadreso por la Kongreso: Antonio Leoni de Leôn, Apartado 7603-1000, San Jose, Kostariko ***m.b.***

Nederlando

Letero al la Redakcio

La porinstruista seminario *[vd. IPR 3/95]*, kiun ni planis por la 15-17-a de marto 1996 - pro manko je partoprenantoj - NE okazos. Anoncis sin nur kelkaj nederlandaj ILEI-membroj, sed bedaŭrinde neniu el la aliaj landoj. Mi bedaŭras, ke malgraŭ nia frutempa anonco kaj vasta publikigo en pluraj internaciaj revuoj ni ne sukcesis altiri interesituloj.

***Hans ten Hagen**, pt. sekr., N.G.G.E.*

Pollando

En urbo Elk kreiĝis privata popollernejo kun klasoj 0-2. S-ino Monika Bilnik gvidas E-kurson por infanoj. Okazos ankaŭ konkurso pri Esperanta poezio. La infanoj deziras korespondi kun samaĝuloj el diversaj landoj. Kontaktadreso:

***Monika Bilnik**, p.k. 56, PL-19-300 Elk, Polio*

Portugalio

La nova sekciestro de ILEI en Portugalio: ***João Santos**, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, 1500 Lisboa*

Slovenio

PEDAGOGIA SEMINARIO KUN VIDEO-FESTIVALO *(el Eventoj n-ro 0091)*

Interkulturo Maribor organizas internacian seminarion pri modernigo de E-instruado inter la 27-a kaj 31-a de julio en Maribor. Estas invitataj ĉiuj, kiuj posedas ideojn aŭ ellaboritajn instruilojn, materialojn, filmojn, bildstriojn, komputilajn programojn ktp., utiligeblajn en diversaj fazoj de E-instruado, aliĝi kaj prezenti tion.

En la kultura parto de la aranĝo okazos video-festivalo kun konkurso pri la plej bona video-filmo '96. Ni prezentos profesiajn, pupteatrajn, pedagogiajn, dokumentajn filmojn en Esperanto. Ĉiu povas konkursi per video-filmo en E-o pri ia ajn temo, sed ne pli ol 20-minutojn longa.
Kotizoj: depende de la lando, aĝo kaj tempo de aliĝo, inter 30 kaj 150 DEM. Kompletaj restadkostoj ĉ. 130 DEM, nura dormado kaj matenmanĝo ĉ. 75 DEM. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: *Interkulturo, Koĉevarjeva 12, SI-62000 Maribor, Slovenio. Tel/fakso: +386-62-221371*

Svislando

INFORMOJ PRI LA DOMPARO

En 1995 okazis naŭ kulturaj monatfinoj en La Chaux-de-Fonds. Kelkaj realigis du, aliaj unu studrondon. Entute estis 11 studrondoj kun 90 ĉeestantoj. La monatfinojn karakterizis la miskontinueco de la studrondoj por progresantoj, la asidueco de la germanlingvanoj kaj la ioma malmultiĝo de franclingvanoj. La meza aĝo estis iom alta, ĉ. 45, sed malmultaj estis emeritoj.
En kadro de kultura monatfino inter la 17-a kaj 18-a de februaro 1996 ***Georges Lagrange*** prelegos pri zamenhofologio kaj ***Judit Felszeghy*** zorgos pri progresantoj. Inter la 23-a kaj 24-a de marto ***Giorgio Silfer*** proponos prelegaron kaj dialogojn kun la titolo *Foliumante cent jarojn de esperanto-teatro*. Rusa instruist(in)o zorgos pri pri progresantoj.
Inter la 30-a julio kaj 4-a de aŭgusto en KCE okazos seminario *Komparado de instrumetodoj en Esperanto*. Ĝin gvidos ***Claude Gacond***, kiu analizos kun la partoprenantoj la plej gravajn instrumetodojn de nia lingvo, kun la celo doti vin per propra instrumetodo. Kontaktadreso: *Postiers 27 - CP 779 - CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando - telefono/fakso (41) 39-267407*

LA LINGVO KAJ TIES BILDOJ

estas la titolo de kolokvo la 6-8-an de marto 1996 en la universitato de Neuchâtel, Svislando. Ĝin organizas: Centro pri aplikata lingvistiko de la universitato Neuchâtel, Romanda Instituto de Esploroj kaj Dokumentado Pedagogiaj kaj Eŭropa Asocio de Lingvistoj kaj Lingvoinstruistoj.
Estos du prelegoj pri Esperanto, unu de ***Lili Papaloizos***, kiu doktoriĝas pri KCE, kaj unu de ***Claude Piron***. S-ino ***Mireille Grosjean*** prelegos pri la lingvaj aspektoj de klasointerŝanĝoj kaj pri sia libro „Echanges de Classes Clé en Main". Kontaktadr.: ***Mireille Grosjean***, *Str. Temple 20, CH-2416 Les Brenets*

PRI „LERNEJO ILO PACEN"

("Ecole Instrument de Paix (EIP)", "School Instrument of Peace")
Julio 1995. 130 personoj el 50 landoj, monda vilaĝo! Dum plena semajno la partoprenantoj povis trejnadi en la kampo de la instruado al homaj rajtoj kaj al la paco. Estis tri paralelaj sesioj, unu en la franca, unu en la angla, unu en la hispana. La paŭzoj okazis samtempe, tiel ĉiu grupano povis rilati kun alisesiano. Matene estis kurso, poste ronda tablo kun 2-3 prelegantoj. Posttagmeze venis praktikaj ekzercoj didaktikaj. La profesoroj estis (mi parolas pri la franclingva sesio, kiun mi sekvis) universitataj profesoroj kaj fakuloj el Ĝenevo, Francio, Montrealo, Afriko, ktp. Loĝado, manĝoj kaj kursoj povis okazi samloke en Céligny apud Ĝenevo, tiel la partoprenantoj povis plej bone konatiĝi kaj interŝanĝi spertojn.
La "Centre International de Formation à l'Education aux Droits de l'Homme et à la Paix" (CIFEDHOP), (Centro internacia pri Lertiĝo je Edukado al Homaj Rajtoj kaj al la Paco) la organizanto de tiu semajno, estas fako de "Lernejo Ilo Pacen". Ĝi ricevas subvenciojn de la svisa konfederacio, pli precize nesvisaj partoprenontoj povas ricevi stipendion. La oficejo de EIP situas en Ĝenevo (Svislando), Simplon 5, 1207 Ĝenevo, tel. 022 735 24 22. Ĝi vartas kaj pri la svisa sekcio kaj pri tutmonda kunagado de landaj sekcioj, iom same kiel UEA. Internacia pedagogia skipo gvidas la CIFEDHOP plej efike. La CIFEDHOPa kurso okazas ĉiujare en julio; 1995 estis la 13a sesio.
Lernejestroj kaj instruistoj pri iuj fakoj povas profiti je tiu altnivela kaj samtempe tre konkreta kurso. Mi rekomendas ĝin al ĉiuj instruistoj. Mi estas je dispono por pli da informoj. Mia adreso estas pf 9, CH-2416 Les Brenets. Mi povas interalie doni al vi la nomon kaj adreson de partoprenintoj el via lando aŭ de landa sekcio, kaze ke tio ekzistas.
Lasta noto: "EIP" estas kreita de Jacques Muhlethaler, mortinta en 1994. Li interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis la lingvon. En siaj multnombraj kontaktoj kun politikistoj, li ofte varbadis por Esperanto.

***Mireille Grosjean**, instruistino, Svislando.*

Reago

Reage al 1/95 kaj 2/95 - Golden

Ne plu mirigas min ekstravagancaj ideoj, reformaj proponoj kaj „senpripensaj" sed subfosaj elpaŝoj de esperantistoj. Ja, kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. Mirigas min tamen, ke strangaj, malkomfortaj kaj sengustaj vestoj tiel facile iĝas modaj. Pro kio ĝuste komencantoj kaj nekompetentuloj tuj pretas al danĝeraj decidoj kaj aproboj? Kial ofte ĝuste instruistoj fuŝas nian lingvon? Kial ĝuste pedagogoj ofte montras nesufiĉan scion pri la instruata lernobjekto Esperanto?
Ni lernu nian lingvon pli serioze, anstataŭ ŝanĝi fundamentan regulon. La konstato de Bernard Golden pri multaj eraroj - koncerne (ne)transitivecon - estas prava, sed ne konduku al ŝajna solvo. Ĥaosigi Esperanton laŭ la modelo de naciaj lingvoj ne povas esti solvo! La Esperanta sistemo - la diferenco inter „boli" kaj „boligi", inter „ruli" kaj „ruliĝi" - faras nian lingvon regula kaj klara. Estus stulte forĵeti tian avantaĝon. Oficiale allasi, ke tia radiko uziĝu dusence povus nur definitive krei malordon. Ĉu ekzempligi Idon? Ĉu Ido vere estu nia modelo kaj gvidilo? Mi kredas, ke ne.

Pli taŭgas la konsilo de Rulofido 95/4. p.20.: „Eble multon ni gajnus, se... kaj elsarkus erarojn." En la sama numero la artikolo de Kurucz pri substantivaj participoj estas perfekte aprobinda. Tiu de Petik pri altaj pretendoj interese traktas la temon „vortordo". Mi tamen ne sentas bezonon pri „un"; sed mi nepre korektus „konsterniga" al „konsterna". Ankaŭ „kunteksto" kaj „hindo-eŭropaj" estas preferindaj, ĉu ne?

Christian Declerck,
Pyckerstraat 79, B-2018 Antwerpen

Ekzamenoj 1995

Dum la jaro okazis 12 sesioj, sed nur 9 rezultoj atingis la sekretarion. Ĉi-jare multaj kandidatoj petis de la sekretario informojn kaj malnovajn testojn, kio sendube plibonigis la finajn rezultojn. Oni daŭre povas konstati, ke la kandidatoj donas pli da atento al la gramatika parto ol al la movadaj kaj literaturaj konoj. La plurjara deziro, okazigi la sesion aparte dum la LIBE-Kongreso, realiĝis ĉi-jare. Tre entuziasma teamo gvidata de s-ino Nora Moerbeek tre brile organizis la sesion. Krom la kandidatoj pluraj ekinteresiĝis pri la ekzamenoj, kio certigas la sesion dum la venonta LIBE-Kongreso.
Ĝenerale oni sentas la mankon de la gvidlibro por la ekzamenoj. Tio eĉ pli mankas al blinduloj, kiuj ne povas mem trovi taŭgan materialon.

E-renkontiĝo, urbo, lando, monato	kandidatoj		landoj	sukcesis	
	elementa	meza		elementa	meza
IJF, Massa, Italio, aprilo	1	—	1	1	—
Zagrebo, Kroatio, majo	2	—	1	1	
LIBE-Kongreso, Onnela, Finnlando, julio	2	5	5	2	4
UK, Tampere, Finnlando, julio	8	10	9	6	8
ILEI-Konf., Övik, Finnlando, jul./aŭgusto	1	3	3	1	3
Barlaston, Britio, aŭgusto	2	6	1	2	—
Lome, Togolando, aŭgusto	6	—	1	4	—
21-a Somerlernejo, Sete, Francio, sept.	1	3	2	1	3
Zagreb, Kroatio, decembro	3	—	2	2	—
	26	27		20	18
	53			38	

Mankas la informoj pri la sesioj en Ĉinio (sept.), Kubo (nov.) kaj Togolando (dec.). Sume sukcesis 38 personoj el 20 landoj. Jen la listo (interkrampe la nombro de la sukcesintoj): Britio (2), Ĉeĥio (1), Danlando (1), Finnlando (1), Francio (2), Germanio (2), **Hispanio (5),** Italio (3), Izraelo (1), Kroatio (3), Kubo (1), Litovio (1), Nederlando (1), Rusio (2), Rumanio (1), Svedio (4), Senegalo (1), Slovenio (1), Taĝikio (1), Togo (4).
Kvankam dum la sesioj oni uzis novajn tekstojn, alvoko al la verkemuloj daŭre validas. Kelkaj eseoj de la antaŭaj sesioj estis prezentitaj en la gazeto Kontakto.

Kompilis: ***Prof. Ivan Bekavac-Basić*** kaj ***Marija Beloševiĉ***

Alvokoj de la Sekretario

ILEI planas kompili du interesajn kalendarojn: kalendaro de diversaj pedagogiaj E-aranĝoj, kalendaro de lernejaj ferioj. La kontribuaĵojn urĝe sendu al M. Beloŝeviĉ, sekretario de ILEI. [*adreso sur la dua kovrilpaĝo*]

La vizito de la reprezentantoj de UEA al la sidejo de UNESKO rezultigis per la projekto kiun realigos ILEI. Temas pri la kompilaĵo kiu prezentos staistikon de la nacilingvaj lernolibroj (por ĉies aĝo) en kiuj oni instruas/mencias homanarismon, internaciismon, E-on (kaj aliajn planlingvojn), Zamenhof kaj mondan lingvan problemon. La kompilaĵon oni prezentos dum la venonta UK. Krom la kopio de la kovrilpaĝo kaj la tuta teksto kie oni trovas la supre menciitajn faktojn, bonvolu aldoni la jenajn informojn: titolo de lernolibro, originala lingvo, jaro de la eldono, verkisto, eldonisto, lernejoj (ĝenerale: ekz. gimnazio, metia lernejo k.s.), lernoobjektoj kaj aĝoj por kiuj oni aplikas la lernolibron, resumon de la teksto.

Pliajn informojn vi povas ricevi ĉe la ILEI-sekretario, al kiu sendu la kontribuaĵojn ĝis la 1-a de marto 1996.

Marija Beloševiĉ

ABC de Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo

ABC en Esperanto estas la plej nova kajero de IĈLM. Ĝi estas 36-paĝa en formato A/4. La kajero prezentas la alfabeton. Ĉiu litero ricevas unu paĝon kun kolorigenda bildo kaj simpla teksto. Oni povas lerni la kolorojn, nomojn de interesaj objektoj, bestoj aŭ homoj, starigi kaj respondi demandojn.
Por ricevi pliajn detalojn kaj akiri la kajeron skribu al:

IĈLM, 3876 Belmont Ave, San Diego, CA-929116 Usono

Globlingvo Esperanto lernebla en 4 horoj

estas la titolo de lernolibro por aŭtodidaktoj, kiun eldonis la Hakusuiŝa Eldonejo. Ĝiaj aŭtoroj estas d-ro Tsukasa Kobayashi, estrarano de Japana E-Instituto kaj Yoko Hagiwara. La 210-paĝa libro kostas 24 USD ĉe:

***D-ro Tsukasa Kobayashi**, Ohizumimachi 2-55-8, Nerima, Tokio, Japanio 178*

Komenio: Orbis pictus

Pasintjare estis festata la 400-a datreveno de la naskiĝo de Komenio. La „Hungara Komenio-Societo" eldonis hungarlingvan memorlibron pri lia agado, suplementita kun anglalingva resumo kaj E-lingva referaĵo. La studo de László Molnár, adjunkto de la Pedagogia Altlernejo en Sárospatak (Hungario) en ses grandformataj paĝoj traktas liajn rilatojn al la lingvoinstruado. Por detaloj kaj kopio kontaktu la aŭtoron: ***László Molnár**, Balassi u. 17. H-3950 Sárospatak,* Hungario. *[NdlR - Pliajn detalojn vidu: MOLNÁR, László: La mondo per bildoj (konferenca temo) IPR 92/2, p.5-8.]*

Korespondaj kursoj
De pli ol unu jaro ekkompiliĝis ĉe TEJO listo de E-aj perkorespondaj kursoj. Tiu listo estas jam konsiderinde ampleksa, sed alvenis pluraj antaŭe nekompilitaj informoj, kune kun aldonoj/korektoj. Ni petas vian kunlaboron (re)informi nin pri ĉiuj tiaj kursoj konataj en via gepatra lingvo/regiono.
Bonvenas la jenaj informoj: kosto, nivelo, nomo de la libro aŭ materialo, daŭro, adreso, ĝeneralaj kondiĉoj. Prefere tiuj informoj estu en la lingvo de la celatoj, kun traduko al Esperanto. Nome de TEJO, elkore dankas:

***James Rezende Piton**, a@turing.unicamp.br,*
Av. Joao Batista M. do Canto, 257/J2 BR-13031-210 Campinas, SP-Brazilo

Lingva Ret-Gazeto
En la Internet-a diskutforumo (novaĵ-grupo) soc.culture.esperanto nun aperas Lingva Ret-Gazeto interesa por personoj de ĉiuj lingvoniveloj, sed speciale por progresantoj kaj instruistoj de Esperanto. Se vi havas komputilon kaj retpoŝtan adreson, sed ne havas aliron al tiu diskutforumo, la redaktoro *Boris Kolker* <gh090@cleveland.freenet.edu> sendos al vi la lastan numeron de la gazeto. Li gvidas ankaŭ la *Internacian Perfektigan Korespondan Kurson* (IPKK). Por ricevi informojn pri IPKK kaj la lecionon 1 el la preparata nova eldono de lia libro „Vojaĝo en esperanto-lando" *[vidu IPR 93/2. p.10-12.]* sendu al li retmesaĝon aŭ ordinaran leteron:

***Boris Kolker**, gh090@cleveland.freenet.edu,*
(216) 579-9561, 1300 Superior Avenue, #2109, Cleveland, OH 44114, USA.

Stipendio Ivo Lapenna *(el Eventoj n-ro 0088)*
Memore al prof. *Ivo Lapenna* (1990-1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties aplikado en la scienco speciale, *Fondajo Ivo Lapenna* starigis *Stipendion Ivo Lapenna*.
La Stipendio konsistas el subvenciado al disertacioj je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L. L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna. En la jaro 1996 *Stipendio Ivo Lapenna* povos esti aljuĝita por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1995. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio, bonvolu peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto *Torben Svendsen, Vanlose Allé, DK-2720 Vanlose, Danio.*
Limdato por la sendo de la faklaborajo en du ekzempleroj estas fino de februaro 1996. Adreso: *D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, AŬstrio*

Toponimia terminaro
Istlia Eldonejo Esperantista eldonis komputilan diskon kun la speciala Esperanto vortaro de *Lawrence Mee*. Temas pri la tria eldono de la konata verko, la Toponimia Terminaro, kiun akompanas ampleksaj tabeloj, glosaro kaj

klarigaj tekstoj. La nova eldono ampleksas pli ol 900 kapvortojn: toponimiojn (= nomoj de lokoj, regionoj, provincoj k.s.), regnonimojn (= nomoj de ŝtatoj) kaj landano-nomojn (en kazoj, kiam klareco estas bezonata).
La tabeloj grupigas la vortojn laŭ diversaj kriterioj. Unu tabelo donas laŭkontinentan indekson, la alia listigas la ĉefurbojn kune kun la valutonomoj, la tria listigas la membrojn de la ĉefaj internaciaj organizaĵoj (U.N., I.M.F., O.E.K.E.). Krome ni trovas tabelon, kiu komparas la landonomojn de la Akademio de Esperanto kun tiuj de la Toponimia Terminaro, kaj ĝi enhavas ankaŭ la liston de la kongresurboj kaj kongreslandoj (UK, IJK, SAT).
La tuto estas konsultebla per ordinaraj funkcioklavoj de la komputilo, laŭ instrukcioj facile memorigeblaj. La programo bezonas kvarcent kilobajtojn de baza memoro. Vi povas uzi ĝin per IBM-kongrua komputilo, prefere kun kolora ekrano. (La Terminaro taŭgas por aliaj formoj de teksto, sed nepre konsultu antaŭe la eldonanton.) La nuna disko estas nur iom pli ol duone plenigita. Tio ebligas la aldonon de dua terminaro sur la la saman diskon. La tuta programo estas bazita sur la sama baza programaro, kiel V-ESP, de la sama Eldonejo.
La Terminaro kostas sep pundojn kaj duono (inkluzive sendokostojn), sed eble plus transpagaj kostoj. Konataj libroservoj ricevas rabaton de unu triono por mendoj de tri aŭ pli da ekzempleroj (sed tiam plus sendokostoj, kaj eventuale ankaŭ plus transpagaj kostoj).
Adreso: *Istlia Eldonejo Esperantista, 91 Whitebeck Court, Moorway Drive, Manchester M92HR, Britio. Tel. +44 (0) 161 682 9659.*
Retadreso: lorensmi@gn.apc.org

Leterkesto

„IPR ESTAS NELEGEBLA"
Tiun rimarkon mi aŭdis en Svislando de bonega E-instruisto, kiu ne membras en nia sekcio. Mi pludemandis kaj ricevis la sekvantajn informojn:
Unue pri grafiko, etaj literoj, papero. Sed la persono agnoskis, ke tio estas neŝanĝebla afero, mona afero, kaj li povas akcepti tion.
Due li aludis al la kontribuantoj: la leganto ne povas scii, kiu ili estas, el kiu lando ili estas, ĉu ili estas profesiaj instruistoj, ĉu ili estas profesiaj instruistoj pri fremdaj lingvoj, ktp. Pro tio mi proponas, ke ĉiu verkanto estu mallonge prezentata... ***Mireille Grosjean***
profesia fremdlingvo-instruistino, fakulino pri klaso-interŝanĝoj, Svislando

NdlR - Ĝenerale mi uzas la litertipon Tempo Esperanto 10 de Eventoj. Post la tralego de la supra rimarko mi faris malgrandan eksperimenton. En la 95/3-a numero de IPR mi ŝanĝis la litergrandecon de 10 al 11. (La titolojn mi ne tuŝis.) Eĉ tiu malgranda modifo rezultis, ke anstataŭ 36 paĝoj mi ricevis 43,5 paĝojn. Laŭ miaj kalkuloj, uzante la literon Tempo Esperanto 11 ni devus

rezigni pri ĉ. 17 %-oj de la materialoj. Mi preferas resti ĉe la originala liter-grandeco, sed samtempe intencas evoluigi la grafikan aspekton de la revuo. (Kvankam mi ricevis averton, ke la revuo devas aspekti iom scienca.)
Ni volonte prezentos la kontribuantojn, sed ili mem decidu, kiujn informojn ni rajtas publikigi. Ni intencas aperigi ankaŭ la fotojn de la kontribuontoj, se ni ricevos ilin.

„KARAJ KOLEGOJ KAJ AMIKOJ,
...Multajn dankojn pro aperigo de iuj miaj linioj en via revuo. Sed mi bedaŭras, ke vi tro redaktas miajn pensojn kaj en via revuo aperis ne tio, kion mi diris.... mi ne skribis, ke la resumo de artikoloj aperu en kelkaj lingvoj - ja ne sufiĉus la revua spaco...
Mi estas certa, ke neniu reeĥos mian anoncitan prespretan lernolibron. Pro tio mi deziras aldoni, ke mi por la starto pretas transdoni kvincent USD al ebla mia helpanto. Mia salajro nuna estas ĉ. 30 USD. Certe mi ne perlaboris tiun ĉi sumon en mia lando. Antaŭ jaroj s-ano ... el Parizo kolektis abonpagon por nia revuo... Mi decidis tiun sumon uzi por ĉi tiu bona afero. La lernolibrojn eblas transporti poparte, helpe de niaj vojaĝantaj amikoj."

Eŭgeno S. Perevertajlo,
ab/k 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, Uzbekio, CIS

IPR 4/1986 SERĈATA
„En mia kolekto mankas la numero 4 de 1986. Mi verkas ion pri la 30 jaroj de ILEI kaj la informoj pri la historio de nia Ligo troveblas ankaŭ en IPR. Kiu povas helpi min?"

Atilio Orellana Rojas
(adreso sur la dua kovrilpaĝo)

En la sekvaj numeroj aperos...

Félix Garcia Blázquez: Didaktikaj problemoj en la instruado de korelativoj
Sylla Chaves: Baza didaktika minimumo (Propono...de 700-morfema listo)
D-ro Georgo Macioszek: Por la suferanta komencanto...
Françoise Noireau: *Pero Ĉimbur: Mi resanigis PPPetron* (recenzo)

Redaktofino por tiu ĉi numero: la 15-a de januaro 1996, por la sekva: la 15-a de aprilo 1996.
Du semajnojn antaŭ la redaktofino nia redakcio jam korektas la provpresajojn, dum tiu periodo la enhavo jam praktike ne ŝanĝiĝas, tiam ni preferas akcepti nur modifojn, mallongajn aŭ urĝajn inform-materialojn.



Jozefo Németh,
redaktoro

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal.
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn.
Hispanio: vakas
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: Masumi Suzuki, Fukaya 122-10, Ayase-shi, Kanagawa-ken, 252
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, 1500 Lisboa
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RUS-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavĉar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*.

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, I-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuajoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu. En urĝaj kazoj vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. Ĝin sendu al la laborejo de la edzino de Jozefo Németh: *Némethné Varga Mária* (36-89) 324953. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.